

revuo

esperanto

decembro 1965

58-a jaro

n-ro 721 (12)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)



P. 206: LA PROBLEMO DE MALSATO

ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 201 Kampanjo por nova milo (Vermaas)
- 202 Pri la agado de la lokaj grupoj:
5. Ekzemplo de modela E-societo (Lapenna)
- 205 Lastaj progresoj de la subskribo-kolektado
- 206 La lukto kontraŭ la malsato (Neergaard)
- 210 Lerneja Bulteno n-ro 6:
L.B. la ponto inter la organizaĵo kaj instruistaro; 2-a Int. Konferenco de Lernejoj; Nova listo de vortoj; Mallongaj informoj; Aldono al la listo de rekomenditaj libroj.
- 213 "La vivo de la amo" (Ĝibran'/Abraham)
- 214 CED
- 215 Recenzoj
- 217 Ricevitaj eldonaĵoj
- 218 Mallongaj novaĵoj
Nekrologoj Obruĉev, Brizzi, Geraci, Saft
- 219 En la grupoj
Esperanto en radio
Letero
50-a Universala Kongreso, Tokio 1965
- 220 La Juna Vivo
- 221 Oficiala informilo n-ro 385:
Kampanjo por nova milo; La nov-zelanda ĉambro
- 223 La internaciaj konkursoj 1965
Anoncetoj

kovrila bildo

Sudana knabino ĵetpurigas mandraŝitan rizon en eksperimenta centro de FAO por rizkultivado por plialtigi la lokan vivnivelon. Vidu artikolon p. 206. (Foto: UN-FAO)

bildojn liveris

- 206 FAO
- 207 (Supre) FAO: Y. Nagata; (malsupre) FAO: Jack Olsen
- 208 FAO: E. Ragazzini
- 209 Unesko-FAO
- 215 Elfelt
- 218 I. Arata

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef. (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1965): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 81 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, 7 Linnaean Street, Cambridge, Mass. 02138, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Ni tuj diru, en la komenco de tiu ĉi artikolo, ke la Estraro kaj Komitato de U.E.A. denove alvokas ĉiujn membrojn helpi la Asocion, sed ni tuj aldonu ankaŭ, ke denove temas ne pri helpo en formo de mono (kvankam ankaŭ tio ĉiam estas ege bonvena!), sed en formo de agado. Denove, ĉar ja ankaŭ la antaŭa alvoko al la membraro temis ne pri mono sed pri agado, nome, pri grandskala kolektado de subskriboj por la propono al U.N. La eĥo je tio estis forta; grandnombre alfluis kaj ankoraŭ alfluadas subskriboj. Kvankam ankoraŭ la ciferoj restas nesufiĉaj kaj kvankam granda nombro da membroj restis pasivaj, tamen klare montriĝis la entuziasmo de multnombraj aliaj membroj fari ion konkretan, malavare oferi energion kaj tempon, se temas pri helpo al U.E.A., al la Asocio kiu entreprenas unu agadon post alia por progresigi la celon de ni ĉiuj: la pluan disvastigon de Esperanto en ĉiaj medioj.

La nuna alvoko koncernas la jenon: Kiel montras la Estrara Raporto ricevita en la Kongreso en Tokio kaj baldaŭ aperonta en la Dua Parto de la Jarlibro, la Asocio suferis gravan deficiton en la pasinta jaro kaj pliaj deficitaj estas antaŭvidataj. La kaŭzoj estas gravegaj altigoj de la prezoj de ĉio, i.a. de presaĵoj, materialoj, salajroj kaj, tre drastaj, de afranko. Tiu lasta por U.E.A., kiu havas regulajn amasajn sendaĵojn al pli ol 80 landoj, estas preskaŭ katastrofa. Kaj jam la nederlandaj aŭtoritatoj anoncis pliajn altigojn por la venonta jaro.

La plej grandaj viktimoj de tiaj altigoj ĉiam estas la nekomercaj entreprenoj, kulturaj instancoj kaj organizaĵoj vivantaj je kotizoj, kiel U.E.A., kiuj ja ne povas kompensi la pli altajn kostojn altigante la prezojn de siaj produktoj. La Estraro kaj Komitato ne volas, en la intereso de la membroj, plialtigi la kotizojn. Spa-

rado je la elspezoj estas farata ĝis maksimumo. Plia ŝparado signifus forigon de esence gravaj kaj valoraj agadoj.

Altigi la membronombro

Sed, la deficitaj devas esti forigitaj. La sola solvo estas pli granda membronombro. Mil pliaj membroj-abonantoj solvos la problemon. *Kaj tio estas ebla.* Ja ĉirkaŭ 20.000 membroj de niaj landaj asocioj ne estas individuaj membroj de U.E.A. Kun la helpo de ĉiu membro, de ĉiu leganto de tiuj ĉi linioj, pli ol la bezonata milo povas esti akirita, se ĉiu akceptas la devizon

ĈIU MEMBRO ALPORTU UNU NOVAN MEMBRON

Tio estu la slogano de la plej proksimaj monatoj. La varbantoj mem ne elspezos monon, kontraŭe, ili povos gajni premion. Varbintoj de pliaj membroj-abonantoj gajnos pliajn premiojn. Detalojn pri la premiado oni bonvolu legi aliloke en tiu ĉi numero sub la rubriko de la Oficiala Informilo. Krome, plej grave, se estos atingita la nombro de 1000 novaj MA, inter la varbintoj estos lotumita aparta premio de 500.— gld (2000 steloj), je dispono por partopreno en Universala Kongreso. Se, kio espereble ne okazos, la nombro de varbitoj restos sub 1000, la lotumita premio estos proporcia.

Ĉiu membro partoprenu tiun ĉi kampanjon por la nova milo. Ne hezitu! Bonvolu ekagi tuj. Esploru en via klubo aŭ asocio, kiuj ankoraŭ ne estas individuaj membroj de U.E.A. Inter la ĉeestantoj de via Zamenhof-vespero sendube troviĝas kelkaj nemembroj. Varbu ilin je tiu bela okazo! Al varbantoj ni volonte disponigos specimenajn ekzemplerojn de la revuo Esperanto. Kun ĉies helpo la kampanjo por la nova milo ne povos ne sukces!

ALIA FAVORA EBLECO

Alia bonvena ebleco helpi ne nur al la Asocio, sed precipe ankaŭ al si mem estas la dumviva membreco. Ĉiuj nunaj membroj-abonantoj bonvolu konsideri ankaŭ tion. Ofte niaj membroj forgesas ĝustatempe pagi la ĉiujaran kotizon, ricevas memorigon, kelkfoje denove forgesas, intertempe ne ricevas la gazeton, poste ricevas plurajn numerojn samtempe ktp. Ili volonte liberigis de tiu ĝeno. Tre facile tio estas solvebla. Oni faru servon al si mem fari-

ĝante unufoje por ĉiam dumviva membro. La kotizo estas nur 20-oblo de la kotizo MA, nome 400 gld (1600 steloj)! Oni vidu ankaŭ paĝon 62 de la jarlibro 1965.

Speciala favoro por tiuj kiuj fariĝas D.M. ekde 1966: kiel premion ili ricevos la altvaloran verkon *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*. (vidu paĝon 7 de Jarlibro II, 1964).

M. H. Vermaas

5. EKZEMPLO DE MODELA ESPERANTO-SOCIETO (daŭrigo)

Objektiveco, firmeco kaj persisto

Kiamaniere AEK sukcesis atingi en nuraj 12 jaroj de sia ekzistado tiom da pozitivaj rezultoj?

La fondintoj kaj la unuaj membroj de la Klubo bone komprenis ekde la komenco, ke por sukcesa laboro necesas lerte kunligi la popularigon de la lingvo kun samtempa instruado kaj interna vivo de la grupo. Tial la Klubo dediĉis egalan atenton al ĉiuj tri aspektoj. La informado celis atentigi pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj, diskonigi faktojn pri Esperanto, instigi al la lernado. En la kursoj estis rikoltataj la fruktoj de la informa laboro. La sukcesaj finintoj almenaŭ parte aliĝis al AEK, fortikigis ĝin nombre kaj kvalite, kio siavice ebligis pli vastan informan laboron, pli grandan interesigon de la publiko, pli multnombrajn kursojn. Ĉiujare ripetigis la samo, kiu tamen ne estis sama, ĉar senĉese aldoniĝis novaj agadoj en la menciitaj tri ĉefaj branĉoj. La evoluo similis al daŭre larĝiganta spiralo.

En la unua jaro de sia laboro la Klubo necese devis limigi la "informadon" al kelkaj manfari-taj afiŝoj, per kiuj estis anoncita la unua kurso. La membroj pendigis ilin en la haloj de la diversaj fakultatoj. Poste aldoniĝis elmontra ŝranketo en la universitata ĉefhalo, kiu enhavis ĉiusemajne novajn informojn pri la Klubo kaj pri Esperanto. El tiu kerno iom post iom kreskis potenca informa aparato, kiu konscie, laŭplane kaj atente pripensite disvastigis la lingvon.

Ne estas eble prezenti tiun laŭgradan evoluon sur tiu ĉi kampo. Sufiĉas diri kelkajn vortojn pri la karaktero de informado en la periodo de florado, ekde proksimume 1934 ĝis 1941.

Konsiderante la distingajn trajtojn de AEK, la informado estis direktita ĉefe al la intelektuloj en la plej larĝa senco de la vorto: de la pli aĝaj gelernantoj en la mezgradaj lernejoj, tra la gestudentoj en la universitato kaj aliaj altgradaj lernejoj, ĝis la liberaj profesioj. La informado estis daŭra, dum la tuta jaro, sed antaŭ la komenciĝo de la kursoj ĝi estis aparte intensa.

La konstanta informado konsistis el artikoloj en la tiamaj plej grandaj tagaj gazetoj de Zagreb, en gravaj fakaj, literaturaj kaj ĝenerale kulturaj revuoj. Ĉiumonate Radio Zagreb disaŭdigis nacilingve mallongan prelegon pri la lingva demando en difinita branĉo kun prezento de la rolo, kiun ludas Esperanto kaj pri la perspektivoj por la plua utiligo de la lingvo en tiu branĉo. La temoj, ekzemple, estis: Esperanto en medicino, Esperanto kaj komerco, Esperanto en turismo, ktp. Ĉiam en la titolo troviĝis la vorto "Esperanto". La prelegoj kompreneble estis anoncataj en la Radio-Jur-

nalo. Ĉiufoje alia membro prelegis, sed la teksto de la prelego mem, antaŭ ol esti legita en la radio, estis pridiskutita en la t.n. rondo de prelegantoj de AEK. La prelegantoj volonte akceptis la kritikojn de siaj kolegoj, faris korektojn, ŝanĝis eĉ tutajn partojn, tiel ke multilate ĉiu prelego estis rezulto de komuna laboro de la tuta rondo. La samo okazis rilate la artikolojn. Estas pli ol klare, ke en tiaj kondiĉoj la prelegoj kaj artikoloj estis elstare altnivelaj.

Longaj artikoloj en gravaj gazetoj

Al la konstanta informado apartenis ankaŭ la raportoj pri universalaj kongresoj, internaciaj konferencoj aŭ aliaj renkontiĝoj, kiujn partoprenis la membroj de la Klubo. Pri la Londona U.K. en 1938, por doni nur unu ekzemplon, aperis tuta aro da longaj artikoloj en la plej gravaj tagaj gazetoj. La regulaj semajnaj kunvenoj de la AEK estis anoncataj dum la tuta jaro en la ĉefaj Zagrebaj gazetoj. La saman poste faris ankaŭ la aliaj zagrebaj societoj, tiel ke en la rubriko "Societa vivo" ĉiusemajne aperis almenaŭ 4-5 informoj pri la programoj de lokaj Esperanto-grupoj en la koncerna semajno. Al la komenca murŝranketo en la halo de la universitato aldoniĝis aliaj en unuopaj fakultatoj kaj eĉ unu sur domo ĉe trafika stratangulo. Unu membro de la Klubo havis la taskon ĉiusemajne ŝanĝi la materialon. La studentoj kaj la publiko al kutimiĝis legi la novaĵojn, kiujn ili enhavis. Al la ĝenerala informado kontribuis la vendado de lernolibroj, vortaroj, eĉ de literaturaj verkoj en kelkaj librovendejoj. Estis tempo, kiam "La Suda Stelo" — la organo de Jugoslavia Esperanto-Ligo — estis vendata ankaŭ en budoj surstrate, kune kun aliaj revuoj. Ne malofte la membroj de la Klubo publikigis tradukojn el Esperanto de bonaj artikoloj, noveloj aŭ poemoj. La simpla mencio en la fino "tradukita el Esperanto" estis per si mem plua helpo al la ĝenerala klopodo diskonigi la lingvon kaj la valorojn kreitajn en ĝi. La jara balo de AEK, kiu ĉiam okazis en tre taŭga salono por almenaŭ 500 personoj, estis siavice anoncata en la gazetoj, per afiŝoj en la urbo, per la radio kaj apartaj, bele presitaj invitoj. Antaŭ la balo oni ĉiam okazigis mallongan trafan programon, parte en Esperanto kaj parte en la nacia lingvo (pro la multnombraj gastoj), tiel ke ankaŭ tiamaniere diskonigis la lingvo kaj la klubo. La jara balo estis fakte vivanta reklamo por Esperanto. Se oni aldonas, ke multaj membroj de AEK estis samtempe aktivaj ankaŭ en aliaj studentaj kaj fakaj organizaĵoj, en muzikaj societoj kaj sportaj kluboj, kie ili ĝuis personan prestiĝon, ke ili ĉiam inter si parolis nur en Esperanto kaj ke ilia esperantisteco estis ĝenerale konata,

tiam oni komprenos ke ĉiuj ĉi facetoj de konstanta informado kune kreis favoran sintenon al Esperanto en granda parto de la publika opinio.

Sur tiu grundo estis farata la intensa informado du fojojn jare, nome antaŭ la aŭtunaj kaj printempaj kursoj por komencantoj. Kutime por ĉiu kurso la Klubo presigis 250 grandajn afiŝojn, 500 malpli grandajn kaj 10.000 flugfoliojn. La grandaj afiŝoj troviĝis sur ĉiuj afiŝlokoj en la stratoj kaj placoj de Zagreb; la malgrandaj pendis en haloj de fakultatoj, en sindikatoj kaj kulturaj societoj; la flugfolioj estis distribuataj en kafejoj, restoracioj, kinejoj kaj teatroj. Ĉiufoje la flugfolioj havis alian tekston, antaŭe pridiskutitan de la tuta Komitato kaj la plej aktivaj membroj. Krome, dum la mallonga periodo de intensa informado aperadis po 8 ĝis 10 artikoloj en la gazetoj kaj plej gravaj revuoj. Anoncoj en taggazetoj kaj per radio, eĉ kinoreklamoj kompletigis la varbadon. Ne surprize, ke al la kursoj aliĝadis, kvankam la aliĝkotizo estis sufiĉe alta, tiom da personoj, ke kelkfoje estis necese malfermi du paralelajn de po minimume 50 gelernantoj.

En sia informa laboro AEK estis ne nur absolute objektiva, sed ankaŭ firma kaj senkompromisa. Oni atente sekvis ĉion, kion oni skribis pri Esperanto kaj entute pri la lingva problemoj aŭ en ligo kun ĝi. Kontraŭ ĉiuj misprezentoj la Klubo tuj energie reagis kaj ne hezitis eĉ plej akre rebati. Ne per senpova kolero, sed per potencaj argumentoj, kiujn oni bone studis. Kiam en la tiama taggazeto "Obzor" — unu el la plej seriozaj en la antaŭmilita Jugoslavio — aperis longa atako kun la kutimaj misprezentoj pri la "artefariteco" de Esperanto, malebleco vivi ĝin kaj similaj stultaĵoj, membro de la Klubo tuj reagis per same longa artikolo. Ekestis longa diskuto sur la paĝoj de tiu gazeto kaj en la fino la kontraŭulo estis devigita publike rekoni, ke li ne estas sufiĉe informita por povi diskuti, aŭ, alivorte, ke li en la komenco aŭtoritate skribis pri io, kion li ne sciis.

Tia estis la informado de AEK.

Konstanta lernejo

La tuta informado havus absolute nenian sencon, se oni samtempe ne ebligis al la interesiĝantoj ellerni la lingvon. La instruado de Esperanto estis unu el la ĉefaj agadoj de la Klubo. Kiel dirite, ĉiujare oni malfermis du kursojn por komencantoj. La kursoj estis nur por gestudentoj, universitatoj kaj pli aĝaj gelernantoj. La fakto ke la gekursanoj, ĝenerale parolante, havis ĝis certa grado egalan lingvan edukitecon, ebligis apliki apartan metodon, en kiu la konversacio ekde la unua leciono ludis la ĉefan rolon. Tute ne necesis klarigi la prononcon, nek eniri en detalojn de la gramatikaj reguloj. Tio ja troviĝis en la lernolibro. La ĉefa afero estis ebligi praktikon de la reguloj kaj vortoj ellernitaj en ĉiu leciono. La lernolibro "Esperanto en Dek Lecionoj" estis adaptita precipe por tiu celo. Okazis,

ke ne ĉiuj finis la kurson. Kelkfoje eĉ duono forfalis. Sed okazis ankaŭ, ke la kurso finiĝis kun pli da gelernantoj ol dum la unua leciono. La kursoj daŭris tiel longe, kiel estis necese, por ke ĉiuj gelernantoj, kiuj restis ĝis la fino, parolu flue la lingvon. Tion oni atingis en 3-5 monatoj, en pluraj kazoj eĉ pli frue. En unu kazo 14-jara knabino — Nada Gropuzzo, kiu poste fariĝis sekretariino de Jugoslavia Esperanto-Federacio — povis flue paroli la lingvon post 15-taga lernado! Iom pensige por tiuj, kiuj hodiaŭ pro nekonataj kaŭzoj senbaze asertas, ke Esperanto estas nur 5 fojojn pli facila ol la fremdaj naciaj lingvoj!

La lastaj 3-4 semajnoj (6-8 lecionoj) estis dediĉitaj al la Esperanta literaturo. La gelernantoj devis hejme legi taŭgan libreton, ĉiu alian laŭ la ebleco, kaj diskuti ĝian enhavon, en Esperanto kompreneble, dum la leciono mem. Krome la gelernantoj ricevis la taskon traduki skribe mallongajn tekstojn el la kroata en Esperanton. Tiuj taskoj estis korektataj de la kursgvidantoj. Ĉar la kurso okazadis du fojojn semajne, el kiuj lunde, tuj post la kurso, estis la regula kluba kunveno, la plej bonaj gelernantoj ricevadis la permeson partopreni ĝin. Tie ili konatiĝis kun la membroj kaj havis la okazon aŭskulti programon en Esperanto, interŝanĝi pensojn en la ĵus lernita lingvo, konsciiĝi, ke ili vere povas paroli ĝin ne nur kun la kursgvidanto, sed ankaŭ kun aliaj personoj. Kiam ili tute spertiĝis, ili povis aliĝi al la Klubo.

La kursoj ne finiĝis per ia formala ekzameno, sed per fakta scio de la lingvo. La plej bonaj kursfinintoj prezentis dum unu el la kunvenoj t.n. "Vivan gazeton", kiun ili mem kunmetis, sen ia helpo de la kursgvidanto, de la komenco ĝis la fino. Tio ĉiam estis granda evento en la kluba vivo. Por la kursanoj ĝi signifis kronon de kelkmonata laboro; por la membroj de la Klubo ĝi estis ĝojiga, ĉar estis formitaj novaj esperantistoj, kiuj morgaŭ kunhelpos en la multflanka laboro de AEK.

Apartaj kursoj por progresintoj, en kiuj oni traktis ĉefe la Esperantan literaturon, kaj aliaj, altgradaj, estis gvidataj por malgrandaj grupoj en la klubejo. En la altgrada kurso estis diskutataj la lingva problemoj ĝenerale, la historio de la Esperanto-Movado, la organiza strukturo de la monda organizaĵo, la Esperanta literaturo, la metodoj de informado, pluraj gramatikaj demandoj (precipe la punktoj, kiuj kaŭzas malfacilaĵojn al slavoj, ekzemple la artikolo), la bazaj principoj de parolarto (tie ekestis la kerno de la verko "Retoriko") kaj aliaj demandoj laŭ la iniciato de la partoprenantoj. Tiuj kursoj estis konstantaj.

Fine, la tuta vivo, ĉiutaga, en la klubejo, la regulaj kunvenoj, la ekskursoj kaj diversaj aliaj renkontiĝoj, dum kiuj oni ĉiam, absolute ĉiam, parolis nur en Esperanto, estis efektive daŭra lernejo de la lingvo. Eĉ en la personaj rilatoj oni ĉiam uzis ĝin. Tio fariĝis tiel natura, ke tutsimple estus nenature paroli en la nacia lingvo. Kaj ĝuste tio kaŭzis, ke la membroj senĝene, flue, sen balbutado parolis Esperanton.

Ekzemplo de modela Esperanto-societo

Cetere, neniŭ povis fariĝi membro de AEK, se li ne regis kontentige la lingvon. Tio estis sendiskuta kondiĉo.

Pulsado de la interna vivo

Dum la tuta laborjaro, de septembro ĝis la fino de junio, ĉiulunde okazis la regula kluba kunveno. La programo daŭris unu horon aŭ pli, sed la diskutoj ofte longiĝis en profundan nokton, se necese en restoracio aŭ kafejo.

La prelegoj estis kutime tre bone preparitaj kaj rilatis al interesaj temoj: fakaj, literaturaj, ĝenerale kulturaj, kelkfoje specife Esperantaj. Mi diras "kelkfoje", ĉar la Esperantajn problemojn oni diskutis ĉefe en la Komitato, en apartaj grupoj aŭ en la superaj kursoj. Post la prelego ĉiam estis libera diskuto kaj la opinioj ofte kunpuŝiĝis. Estis eĉ akraj diskutoj, sed neniam ili transformiĝis en sterilajn disputojn, ankoraŭ malpli degeneris en malamikecon. Temis pri malsameco de opinioj kaj ne pri malamikecoj inter personoj. Se necesis kritiki la preleginton el lingva vidpunkto, oni ne hezitis tion fari. Kaj se la kritiko montriĝis prava, la preleginto mem estis dankema pro ĝi. Ankaŭ laŭ tiu vojo la lingva nivelo senĉese altiĝadis.

Aŭskulti nur prelegojn povus tamen fariĝi iom enuiga, eĉ se ili estas tre bonkvalitaj. Tial en la Klubo oni aranĝis ankaŭ literaturajn vesperojn, dediĉitajn al literaturo de difinita lando. En tia kazo la programo konsistis el enkonduko, legado de prozaj partoj kaj deklamado de selektita poezio el la koncerna literaturo. Aparte allogaj estis la muzikaj vesperoj, dum kiuj la kluba arĉokvarteto ilustris per sia ludado la prezenton de la preleganto. La unuan lundon de ĉiu monato estis "Viva Gazeto" kun ĉefartikolo pri iu aktuala problemoj de la Esperanto-Movado, pluraj artikoloj pri diversaj interesaj temoj, teatra kaj filma rubrikoj, felietono kaj humuro. Unu membro estis la redaktoro (en la vera senco de la vorto), kiu prizorgis ĉiun unuopan numeron. Okazis ankaŭ diskutvesperoj pri difinita temo, dum kiuj unu aŭ pluraj membroj de ĉiu flanko priparolis la koncernan demando.

La klubaj kunvenoj estis tiel interesaj kaj viglaj, ke estis vera plezuro ĉeesti. Tial ili estis ĉiam bonege vizitataj.

En la klubejo mem troviĝis la biblioteko kaj la legejo. La membroj povis ĉiutage viziti ĝin, prunti librojn, legi ĉiujn pli gravajn gazetojn, inkluzive plurajn organojn de landaj asocioj, kiujn la Klubo abonis. AEK estis membro de la tiama AELA kaj aĉetis por sia biblioteko ĉiujn novajn publikaĵojn. Tiamaniere la Klubo ne nur ebligis al la membraro legi gravajn verkojn kaj periodaĵojn, sed ankaŭ helpis la eldonistojn.

En printempo kaj somero la Klubo organizis ekskursojn dum la festotagoj. Certe ne ĉiuj partoprenis, sed ofte la grupo de ekskursantoj konsistis el 20 aŭ eĉ 30 membroj. Dum la eks-

kursoj oni ludis, sportis, kantis, aŭ denove diskutis diversajn demandojn. Ankaŭ tie la lingvo vivis, la amikecoj fortikiĝadis, la esperantista konscio firmiĝadis....

Financaj rimedoj

Eble oni demandos sin: de kie la financaj rimedoj por evoluigi tiel ampleksan agadon? Ili venis de diversaj fontoj. En la komenco la ĉefa pli granda fonto estis la t.n. "membroj-fonditoj", kiuj pagadis unu fojon por ĉiam la sumon de 500 dinaroj ⁷⁾. La unua membro-fondinto estis d-ro D. Maruzzi, unu el la plej elstaraj pioniroj de la Jugoslavia Esperanto-Movado en la periodo post la Unua Mondmilito. Poste sekvis pluraj aliaj. La kotizo estis 60 dinaroj jare, sed oni povis ĝin pagi en monataj partopagoj de 5 dinaroj (la kasisto havis sufiĉe da laboro). La aliĝkotizo por la kursoj estis 50, poste eĉ 100 dinaroj, kaj tiu kotizo komplete pagis la kostojn de afiŝoj, flugfolioj kaj aliaj varbiloj. Eĉ restis iom da mono. Sufiĉe grandan enspezon donadis la disvendado de la lernolibro, de la broŝuroj kaj aliaj eldonaĵoj de la Klubo, ĉar la aŭtoroj rezignis pri ĉia ajn kompenso. Eĉ la publikaj prelegoj, ekzemple tiuj en la Popola Universitato, alportis gajnon, ĉar oni devis pagi por la enirbileto. La jara balo ankaŭ estis tre profitdona, kvankam oni devis pagi sufiĉe altan sumon por la salono, unuaranga muziko, dekoracioj, ktp. La profito ĉefe venis el la bufedo, por kiu la unuopaj membroj senpage donis sandviĉojn, kukojn, trinkaĵojn k.a. Cio kune, tio donis tiom da enspezoj, ke oni povis facile fronti ĉiujn elspezojn. Oni volonte pagis la kotizojn kaj enirbiletojn por diversaj aranĝoj, ĉar ĉio estis sur tre alta nivelo kaj neniam oni bedaŭris la ĉeeston. Cetere, estas menciinde, ke la luon por la klubejo prizorgis, tute ekster la Kluba kaso, 10 membroj, kiuj tiucele ĉiumonate kontribuis po 30 dinaroj.

☆

En la grandega plimulto de la landoj, en kiuj hodiaŭ ekzistas Esperanto-Movado, la cirkonstancoj nuntempe certe ne estas malpli favoraj ol estis tiuj, dum kiuj aktivis AEK. Male, ili estas el ĉiuj vidpunktoj multe pli bonaj. La materia vivnivelo sendube altiĝis. La teknika progreso ebligas utiligi ankaŭ aliajn rimedojn de informado kaj aliajn metodojn por fari la kunvenojn de la lokaj grupoj eĉ pli interesaj ol estis la aranĝoj de AEK en Zagreb. Por la informado oni povas utiligi hodiaŭ ne nur la radion, sed ankaŭ televidon. La programojn de la kunvenoj oni povas facile riĉigi per sonbendoj, gramofondiskoj, lumbildoj. Nenio efektive malhelpas, ke en multaj lokoj la Esperanto-societoj ne nur egalas, sed eĉ konsiderinde superu la laboron, kiun siatempe faris AEK, kaj la rolon kiun ĝi ludis kaj kiu sentiĝas ĝis hodiaŭ.

(daŭrigo dekstre)

⁷⁾ Por doni ideon pri la tiama aĉetopovo de la dinaro, mi diru, ke en tiu tempo kompleta tagmanĝo en bona restoracio kostis ĉ.10 dinarojn.

ANKORAŬ RESTAS TEMPO POR KOLEKTI SUBSKRIBOJN !

la jaro de internacia
kunlaboro, jaro de la
int. lingvo esperanto

Stato je 4 novembro 1965

Proksimume 2 monatojn antaŭ la limdato por la ricevado de subskribo-folioj en la Centra Oficejo (la fino de decembro) la sumo de individuaj subskriboj jam ricevita estis 329 557. Enkalkulante grandan kvanton jam nombritan kaj ekspeditan el Japanujo, la monda sumo estis 475 916 individuaj. La monda sumo de organizaĵoj altiĝis ĝis 2649, kies suma membraro atingas ĝis preskaŭ 45 milionoj. Ĉiuj kolektantoj kaj perantoj bonvolu nepre atenti la limdaton: 31 decembro 1965.

Japanaj eminentuloj

Laŭ anticipa informo de Oomoto, ĝiaj kolektantoj varbis la subskribojn i.a. de 2 ministroj (Hiroŝi Kanda, ministro por publika bonstato, kaj Soiči Usui, ŝtata ministro), 88 parlamentanoj, 13 guberniestroj kaj 52 urbestroj. Aliaj



Jacques
Vendroux,
viceprezid-
anto de la
Eŭropa
Parlamento

menciindaj estas Eizo Kobajaŝi, eksministro por publika bonstato; Takeĉio Macuda, eksministro de edukado; Kenĵi Hukunaga, eksministro de laboro; Jasumi Kurokane, ekssekretario ĝenerala de la Kabineto; Noboru Takeŝita, vic-sekretario ĝenerala de la Kabineto; Suehiro Niŝio, prezidanto de la Demokrata-Sociala Partio; Hideki Jukaŭa, la nobelpremiita fizikisto; la rektoroj de la universitatoj de Kioto, Okajama, Ooita kaj Jamaguĉi; la kritikistoj Tadao Umesao kaj Ŝintaro Rju; la verkistoj Raiĉo Hiracuka, Mikiko Nakagaŭa, Musei Tokugaŭa, Tacuzo Iŝikaŭa, Joiĉi Nakagaŭa kaj Seiĉo Macumoto; kaj la prezidanto de la Japana Unuiĝo por Mondregistaro, Sumi Jukaŭa.

Ankaŭ en aliaj landoj la nombro de eminentuloj forte kreskis: ekz. 72 parlamentanoj svedaj kaj 21 novzelandaj. Notindaj estas: W. A. Fox, Mabel Howard, Hugh Watt kaj J. Mathison, ĉiuj antaŭaj ministroj en la novzelandaj registaro; la episkopoj de Monako kaj de Leiria, Portugalujo; s-ro Jacques Vendroux, urbestro de Calais kaj samtempe vicprezidanto de la Eŭropa Parlamento (organo de EEK); la kulturministroj de la germanaj ŝtatoj Heslando kaj Sarlando; d-ro Lorenzo Garcia, verkisto, eksministro provinca en Argentino; s-ro Gaston Figheira, konata urugvaja verkisto; la urbestroj de la ĝemeliĝintaj urboj Jokohama kaj San Diego.

Televida intervjuo pri JIK

Okaze de la Tago de Unuiĝintaj Nacioj la Sarlanda Televido intervjuis la ĝeneralan sekretarion de UEA pri la kontribuo de la Esperanto-movado al JIK. Pli frue li jam partoprenis en radio-intervjuo kaj faris dekon da prelegoj pri JIK kaj UN. La 29-an de oktobro s-ro Becker traktis kun oficistoj de la Eŭropa Konsilantaro en Strasburgo, rezulte de la internacia seminario, kiun TEJO organizis en Ljubljana kiel kontribuon al JIK.

Al la rekorduloj aldoniĝas: s-ro Penĉo Petrov (Bulgarujo) — 6069 individuaj subskriboj!

(daŭrigo de maldekstre)

Krome, en tiu tempo ankaŭ la monda organizaĵo estis disŝirita kaj internaj organizaĵaj luktoj paralizis vere mondiskalan agadon. Nuntempe UEA estas pli potenca ol iam antaŭe kaj ĝiaj servoj tiel multnombraj, ke tio konsiderinde faciligas la laboron de ĉiu loka grupo. Oni vere ne povas plendi, ke oni ne havas materialon por objekte informadi. Ĝin abunde donas la Informa Fakto de UEA, CED, la organoj de la Asocio, la Estrara Raporto kaj la tuta agado de la Asocio. Kiajn bonegajn raportojn oni povus hodiaŭ fari en la lokaj gazetoj kaj kulturaj revuoj pri la novaj literaturaj verkoj, aparte pri la Serio Oriento-Okcidento, pri la

Belartaj kaj Oratoraj Konkursoj, pri la ISU, pri la altnivelaj teatraĵoj prezentitaj dum la lastjaraj kongresoj, pri la Jaro de Internacia Kunlaboro ktp., ktp.? Kiom da bonegaj artikoloj el "Esperanto", "Monda Kulturo", "Kontakt", "Norda Prismo" kaj multaj aliaj revuoj povus aperi en nacilingvaj tradukoj? Necesus nur iom pripensi ĉiujn ĉi eblecojn kaj havi bonan volon por ekspluati ilin ĝis maksimumo.

Sian bonegan artikolon E. L. M. Wensing titolis "Kie Formiĝas la Vera Esperantisto?" La respondo altrudiĝas per si mem: ĝi estas la loka grupo.

Ivo Lapenna

esperanto
decembro 1965

LA LUKTO KONTRAŬ LA MALSATO



Paul Neergaard

Ciu tago pliproksimigas nin al monda katastrofo. La homaro kreskas multe pli ol la produktado de nutraĵo. Hodiaŭ la loĝantaro de la tero estas tri miliardoj, sed en 1980 jam 4 miliardoj kaj en la jaro 2000 ni per konstanta kresko estos 6 miliardoj. Tio estos duobliĝo en 40 jaroj, kun meznombra jara kresko de pli ol 60 milionoj.

Du trionoj de la loĝantaro de la mondo vivas neimageble mizere, ĉe la limo de konstanta malsato. En la koncernaj landoj la loĝantaro pligrandiĝas per 2,5-3,5% po jare aŭ 2-3-foje pli rapide ol iam ajn kreskis la loĝantaro en Eŭropo. Pliboniĝo de tiu evoluo ne estas videbla. La kreskado okazas spite al la fakto, ke la infanmortado en tiuj landoj estas multe pli granda ol en Eŭropo, ekz. en Brazilo mortas en la unua vivjaro po 170 infanetoj el 1000 vivenaskitoj, en Hindujo 100, dum ekz. en Danlando nur 22. En Sudafriko la negraj infanetoj mortas 10-foje pli ofte ol la infanetoj de la privilegiita blankula klaso.

La nutraĵproduktado progresas en grandaj regionoj de la tero multe pli malrapide ol la nombro de la loĝantaro. Dum kvin jaroj (1959-1963) la nutraĵproduktado por ĉiu individuo en Sudameriko malkreskis meznombro per 3%, en la dense loĝata Malproksima Oriento (ekster Ĉinujo) per 2%! Aliflanke en aliaj mondpartoj

ĝi konsiderinde kreskis, ekz. en Okcidenta Eŭropo per 20%, en Orienta Eŭropo per 46%, en Nordameriko per 17%.

Cu la riĉaj landoj do povus helpi al la malriĉaj simple per liverado el sia abundo de nutraĵoj? Ne, nepre ne! Oni kalkulis, ke la superresta produktado en la riĉaj landoj povus ĉiujare nutri 40 milionojn da homoj. Tio estus guto en la maro — la ĉiujara kresko estas kiel dirite 60 milionoj.

Ekzistas nur unu eblo por efike lukti kontraŭ tiu ĉi fatala evoluo. Oni devas krei la politikajn, sociajn, ekonomiajn kaj teknikajn kondiĉojn por pliintensigo de la agrikultura produktado en la evolulandoj mem, samtempe klopodante efike reguligi la kreskadon de iliaj loĝantaroj. Mallonga formulo, sed giganta tasko.

Lanĉo de mondkampanjo

Parto de ĝia realigo konsistas el efika informado. Veki la konscion de la mondo pri la minaco de la danĝero estas ĝia unua programero. El tiu ĉi vidpunkto la tre aktiva ĝenerala direktoro de FAO, la Organizaĵo de Agrikulturo kaj Nutraĵo de Unuiĝintaj Nacioj, la hindo B. R. Sen, en 1959 proponis realigi en la jaroj 1960-1965 mondkampanjon por "liberiĝo de malsato". Tiu kampanjo daŭros ankoraŭ ĝis 1970.

*Maldekstre: Eksperimento pri fiksado de dunoj en Libio. Akacioj (*Acacia cyanophylla*) estas plantitaj por teni la teron, same plantoj de *Saccharum Aegypticum* importitaj el Tunisio. FAO-specialisto esploras ricinplantojn.*

Dekstre: El projekto por pli bona utiligado de sterkaĵoj en Kostariko. Oni elprenas specimenojn de tero por determinado de ĝia enhavo de planto-nutraĵoj.

Jen kelkaj el ĝiaj gravaj labortaskoj. —

Pliintensigo de nutraĵproduktado — novaj kultivataj areoj!

Nur malgranda parto de la tero estas hodiaŭ utiligata por kultivado. La kultivataj areoj en la mondo reprezentas nur 1/2 hektaron por ĉiu homo. En Latinameriko nur 4% de la tero estas kultivata. Nur dekono de la tero super marnivelo estas hodiaŭ kultivata. Tiun areon oni povas minimume triobligi utiligante kultiveblajn areojn, sed novaj teknikoj ankoraŭ pligrandigas la eblojn.


Grandegaj areoj estas perditaj per la detruaj fortoj de la naturo, malavare helpitaj de la malsaĝeco de la homo. Antaŭe arbarokovritaj terenoj estis dum jarcentoj avide kaj senpripense forhakitaj kun la rezulto, ke nudaj areoj estis postlasitaj al la daŭraj efikoj de venta blovado kaj akva frotado, al la erodado. Tiu ĉi erozio postlasis dezertojn, kie antaŭe estis fekundaj kampoj kaj arbaroj. Kiam sur vastaj areoj malaperas la vegetaĵoj, kiel okazis en Ameriko kaj Azio, tiam la klimato ŝanĝiĝas, malaperas akvo, malaperas vivo. Sabloŝtormoj forbalaas la teron kiel gigantajn polvonubojn kaj remetas ĝin sur malpli oportunajn lokojn. Riveroj forkondukas la valoran humon kaj verŝas ĝin en la maron. En Usono, lando teknike tiel alte evoluinta, areoj egalaj al la tuta agrikultura areo de Danlando estis detruitaj ĉi-maniere en la nura periodo 1941-1954! Antaŭ kelkaj jaroj oni konstruis aŭtovojojn en Tunisio kaj metis ĝin 25 cm. super la ĉirkaŭanta tereno pro sekureco kontraŭ fluganta sablo, sed nur 2-3 jarojn poste la ŝoseo estis samnivela kun la ĉirkaŭa tereno kaj la sablo kovris ĝin kelkloke.

Trudas sin do la tasko haltigi la detruajn efikojn de la erozio. Tio estas farebla antaŭ ĉio per replantado sur la detruitaj terenoj. per rearbarigo, reforestigo. En Proksima Oriento oni grandskale plantas, ekz. en Jordano, Libano, Libio. En Libio oni plantas sub gvidado de FAO-specialistoj akaciojn kaj ricinojn (amerik-oleo-plantojn) por fiksi dunojn tiel haltigante daŭran plivastiĝon de la dunareoj.

Kelkloke salvenenado de la tero estas eĉ pli detrua ol erozio. Kiam la subgrundo havas altan salenhavon kaj samtempe altan akvonivelon kun forta vaporigo, la saloj estas tirataj kun la akvo de la subgrundo al la superaj tavoloj kun la fina rezulto, ke plantoj tie ĉi ne plu povas kreski. Tiel vastaj terenoj



Malsupre: Laboratoria asistanto en veterinara instituto en Birmujo laboras pri produktado de vakcino kontraŭ bestmalsano. La instituto nun produktas 18 vakcinojn kaj disdonas ilin al la kamparanoj.



La lukto kontraŭ la malsato


kovriĝas de kristaleca salo, kiu elokvente atestas, ke ĉi tie la naturo akaparis ĉiujn povojn de la homo. Ĉiujare pakistanaj kamparanoj forlasas ĉ. 10.000 hektarojn da tero, ĉar ili ne plu povas kultivi ilin. Per teknika helpo de FAO oni en pluraj landoj grandskale klopodas regajni la perditan teron per ellavado, sensaligo de la tero. Kursoj estas aranĝataj por teknikistoj el la evolulandoj pri analizado de salvenenado. Ĉiam la principo de tiaj edukprogramoj estas helpo al memhelpo!

Pligrandigo de rikoltaĵoj

La agrikulturo estas en vastegaj regionoj neimageble primitiva. La sterko de la brutoj ofte estas utiligata, ne por nutri la plantojn, sed por konstrui kabanojn aŭ kiel brulaĵo. En Danlando oni uzas meznombro 130 kg. da sterko por ĉiu hektaro, en Japanujo eĉ 250 kg., sed en Hindujo nur 1 (unu) kg. La kamparanoj en la evolulandoj ne havas monon por aĉeti sterkadon, kaj ili ankaŭ ne scias uzi ĝin ĝuste. Speciala programo de FAO klopodas per loka montrado kaj eksperimentoj evidentigi la avantaĝojn de ĝusta sterkado, ekz. en Kostariko, Honduro, Kolombio kaj Gvatemalo. En Hindujo FAO-eksperimentoj montris, ke se la tero nur ricevas la nitrogensterkon bezonatan, la rikoltaĵo tuj pligrandiĝas per 50 %!

Akvado, kvankam utiligita jam de jarmiloj ankaŭ en la evolulandoj, povas doni mirigajn rezultojn se oni aplikas novajn raciajn metodojn. En Brazilo akvado de kafarboj kvinobligis la rikolton. Inter la tropikoj akvado ebligas

En pakistana bazaro. Ja troviĝas gravaj nutraĵ-vendejoj, sed mankas aĉetantoj, ĉar preskaŭ ĉiuj trovas la prezojn tro altaj.



2-3 rikoltojn jare anstataŭ kiel nun nur unu rikolto. Iuj legomoj povas esti rikoltataj eĉ 7-foje kiel nun farate en Israelo kaj Ĉinujo.

Plibonigo de laboriloj povas ege kontribui al la pliintensigo de agrikulturo. Ofte oni devas rompi kutimojn de jarmiloj. Eta plibonigo povas fari miraklojn, ekz. uzado de bona hakilo anstataŭ pintigita bastono, aŭ longklinga falĉilo anstataŭ serpo, aŭ plibonigo de primitiva plugilo, ofte simpla ligna, ekz. pintigita branĉo, kiel mi vidis ĝin dum mia vizito en Etiopio antaŭ kelkaj jaroj. Uzado de traktoroj estas ne tiel facile enkondukebla en evolulandoj, kiel oni povas supozi, ĉar tia enkondukado bezonigas riparojn kaj — ne malpli, riparistojn! Neglekto de tiu simpla fakto kreis multajn obstaklojn plurloke, kie oni kun granda optimismo komencis konkeri la kampojn per eŭropaj aŭ usonaj traktoroj. Ankaŭ antaŭjuĝoj malhelpas. La fama etnologo Margaret Mead rakontas pri iuj primitivaj kamparanoj en Hindujo, la bajgaoj, al kiuj oni kiel parto de teknika helpoprogramo proponis uzadon de feraj plugiloj. Kvan- kam ili konfesis, ke tiuj ĉi plugiloj estas multe pli efikaj ol iliaj propraj lignaj plugiloj, ili nete rifuzis la modernajn ilojn. La rilato inter tiuj kamparanoj kaj ilia tero estis preskaŭ religieca. La bajgaoj ne deziris rekompenci la belan malavarecon de la Terpatrino per ... kiel ili diris ... tiu krudeco, ŝiri ŝiajn mamojn kaj distranĉi ŝian ventron. Ili trovis, ke la ligna hakilo estas pli milda laborilo.

Lukto kontraŭ plantmalsanoj kaj damaĝbestoj estas organizata surbaze de projektoj, i.a. por malkovri la vojojn de disvolviĝo de la koncernaj amasatakoj. Ekzemple la amasatakoj de akridoj en Afriko, kiuj dum jarmiloj disvolviĝis ofte katastrofece, estas studataj de specialistoj, kiuj koncentras siajn klopodojn ĉirkaŭ la evolucentoj, la reproduktocentroj de la insektoj, precipe sur la araba duoninsulo. Multaj landoj kunlaboras en la projekto. Se oni sukcesas sufoki la amasproduktadon de la insektoj ĝuste tie, kie ĝi naskiĝas, oni povas regi la minacojn.

Lukto kontraŭ bestmalsanoj estas same gravega, kaj sukceso en tiaj klopodoj povas havi tujan pligrandigan efikon al la produktado. Ekzemplo estas la prilukto de la brutpesto en Nepalujo. Tiu malsano mortigas en Azio kaj Afriko ĉiujare ĉ. 2 milionojn da brutoj, sed ĝi povus esti ekstermita se oni produktus sufiĉe da vakcino kaj edukus sufiĉe da specialistoj por la bezonataj laboratorioj ktp. FAO komencis en Nepalujo tian projekton pri brutvakcinado antaŭ 2-3 jaroj, Hindujo laboris jam plurajn jarojn samcele kaj vakcinis dum 10 jaroj 130 milionojn da brutoj el entute 224 milionoj. Oni atingis grandajn rezultojn, kiuj tamen estis konstante minacataj de la epidemioj en Nepalujo. Nun oni esperas baldaŭ plene regi la situacion en tiu parto de Azio, kiu bezonigas ĉiun bruton por plugado, por transportado, por laktoproduktado, ktp.

Same oni efike priluktas malsanojn de kokinoj. La furiozado de tia malsano preskaŭ malebligis kokinproduktadon en grandaj regio-

noj de Azio. Per sistema vakcinadkampanjo en Singaporo, kiu daŭris 7 jarojn, oni ekstermis la malsanon. La nombro de la bestoj plialtiĝis de 600.000 ĝis ĉ. 5 milionoj, kaj la ovproduktado kreskis per 800%, kaj nova industrio disvolviĝis. En Libano per simila projekto lastatempe la kokinproduktado en la daŭro de du jaroj duobligis dank' al racia malsanprilukto.

Pligrandigo de fiŝkaptado

Aliaj projektoj celas plifaciligi kaj pligrandigi fiŝkaptadojn. Kvankam la maroj kovras 70% el la surfaco de la tero, ili liveras nur 1% de la nutraĵo de la homo kaj 10% de la proteino uzata. Oni ĉiujare kaptas ĉ. 30 milionojn da tunoj. Oni povus sen malbona efiko al la mara fiŝaro duobligi la kaptadojn.

FAO-spertuloj en diversaj lokoj instruciis fiŝistojn pri pli raciaj kaptometodoj. Ili helpis konstrui novajn tipojn de boatoj kaj iloj. En Cejlono oni provizis la primitivajn fiŝistajn boatojn per surpenda motoro. Tio ĉi kontribuis por plialtigi la kaptadojn per 600% kaj la enspezojn per 300 %.

Rekta fiŝvartado ankaŭ eniras la projektojn de FAO. Precipe lagoj povas esti pli bone utiligataj, se oni biologie prizorgas ilian enhavon de fiŝoj. Eĉ la inunditaj rizkampoj povas esti utiligataj por fiŝproduktado, tiel ke oni ĉi tie povas rikolti ne nur rizon, sed ankaŭ konsiderindan kvanton da fiŝoj.

Sanĝo de manĝokutimoj

En multaj landoj la malsatmizero estas grandparte kaŭzata de unuflanka nutrado. Ekz. en Hindujo 85 % de la nutraĵo estas bolkuirita rizo, kiu estas tre malriĉa je proteino. Pli ol unu miliardo da homoj en la mondo ne ricevas manĝaĵon, kiu enhavas la vivnecajn substancojn. Tiu nesufiĉa nutrado kaŭzas kronikan lacecon, gravajn mankomalsanojn, i.a. la teruran malsanon kvaŝiorkoro (patologia pufiĝo de la stomako, krevetiganta haŭto ktp.), kaŭzata de proteinmanko, kaj altan infanmortadon. En multaj evolulandoj mortas pli da infanoj inter tiuj en la 2-a ĝis la 4-a vivjaroj ol en la unua, dum kiu la patrino lakto tamen donas iom da protektado. En Usono oni manĝas 12-oble pli da animala proteino ol en Indonezio. Unesko kaj FAO organizas instruadon pri pli bonaj manĝokutimoj en multaj landoj.

Familiplanado

La alia gravega flanko de la monda nutradproblemo estas la ebloj limigi infannaskadon, la t.n. familiplanado. La problemo estas malfacila, ĉar treege dependa de religiaj konsideroj, antaŭjuĝoj kaj entute de nesufiĉa ĝenerala klero en la publiko de la koncernaj landoj. Konsultaj klinikoj fonditaj en Hindujo renkontis neniun komprenon pri la graveco de la problemo. Skandinavia propono al la 17-a Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj ne gajnis sufiĉan aprobon, kvankam ĝi havis tre moderan



Vilaĝa montrado de novaj kuirmetodoj. Unesko-spertuloj verkis gvidilon pri novaj kuirmetodoj, speciale taŭgan por Gano, edukis instruasistantojn, kiuj poste instruas vilaĝanojn.

formon, ĉar ĝi nur temis pri simpla teknika helpo al tiuj registaroj, kiuj deziras doni informadon pri naskolimigo al sia publiko. Nur 34 el 110 ŝtatoj-membroj de UN voĉdonis por la propono.

Ciuj landoj konsentas fari ĉion necesan por limigi la infanmortadon. Sed la perspektivoj por la klopodoj limigi la naskonombron ankoraŭ estas obskuraj. Nur per teknika, ekonomia kaj edukeca disvolviĝo en la evolulandoj oni povas esperi pri maturiĝo de tiuj socioj tiurilate, tiel ke famiplanado vere povas efektiviĝi.


La estonteco

Ĉu la granda projekto sukcesos?

Industriigo estas la necesa bazo por pli efika nutraĵproduktado. Eŭropo bezonis jarcentojn por industriigi sian produktadon, Japanujo, utiliginte la spertojn de Eŭropo, bezonis nur 80 jarojn, Sovetunio 40 jarojn, Ĉinujo nun industriigas rapidege. Aliaj evolulandoj sekvas, la mondbildo rapide povos ŝanĝiĝi. Nur post la industriigo sekvas la evoluo de la agrikulturo, la ĝenerala vivnivelo laŭgrade plialtiĝos kun sia biologia influo ankaŭ al la proporcio de naskado, kiel ni spertis en la bonstataj landoj.

La kampanjo de FAO estas nur eta komenco. Ĉi tiun helpon devas doni tiu triono de la homaro, por kiu saneco kaj bonstato estas io memkomprenebla, al tiuj du trionoj de la homaro, kiuj vivas en mizero kun ties fatalaj sekvoj de malsatkatastrofoj kaj konfliktoj danĝeraj al ĉiu el ni. Hodiaŭ la paco en la mondo dependas de la ĉiutaga vivo de niaj kunhomoj kie ajn sur la tergloblo.

esperanto
decembro 1965



LERNEJA BULTENO LA PONTO INTER LA ORGANIZAĴO KAJ INSTRUISTARO

red.: s-ro J. Toczyski

Ne estas facile en nunaj cirkonstancoj re-dakti tiun — certe unu el la plej gravaj partoj de nia revuo — Lernejan Bultenon. UEA, preninte sur siajn ŝultrojn tiun respondecan taskon, volis formi realan ponton inter nia organizaĵo kaj la esperantista instruistaro, kies tuŝeblan korpon formas ILEI, sed al kiu apartenas ankaŭ granda nombro da instruistoj esperantistoj neorganizitaj kaj ne sentantaj la bezonon esti en iu ajn organizaĵo. La problemoj, kiuj atendas sian prezenton en nia bulteno, estas vere abundaj, kaj eĉ ne estas ebleco ĉiujn samtempe almenaŭ tuŝeti en la modestaj kadroj de la bulteno. Ni volas tamen almenaŭ iome fari niajn eblojn. Ni petas do ĉiujn niajn legantojn prikonsideri la fakton, ke nia bulteno devas havi karakteron de universaleco, ke ĝi devas reprezenti la opiniojn kaj la bezonojn de nia TUTA movado, ke ni absolute ne povas limigi nian vidhorizonton nur al la angla, finna, nederlanda aŭ pola tereno, eĉ ne al la eŭropa, sed ni devas bone orientiĝi kaj esplori la lerneajn problemojn ekzistantajn sur ĉiuj kontinentoj. Pro tio ni bezonas nepre, tuje kaj amase el via flanko, karaj gekolegoj — helpon. Helpon en formo de informoj, de ĝustaj prezentoj de la problemoj naskiĝantaj en la lerneja klaso kaj lernejestra kabineto. En formo de kritikoj kaj proponoj, en formo de sugestoj kaj raportoj kaj en formo de konkretaj artikoloj prezentantaj proprajn spertojn kaj proprajn atingojn en la instruado kaj poresperanta laboro sur la lerneja kampo. Ankaŭ ni bezonas informojn pri viaj kontaktoj kun landaj instruistaj organizaĵoj kaj sindikatoj, kaj pri la eblecoj ekzistantaj en ili por eventuala kunlaboro kun Esperantaj organizaĵoj.

La plej urĝa kaj la plej grava afero, kiu ĉiam estis kaj estas nia aĥila kalkano, estas la *statistiko*. La ciferoj pri kiuj ni disponis kaj nun disponas absolute neniam respegulis la veran staton de Esperanto-instruado en la

lernejoj. Ne por memlaŭdo do, sed por la bono de la afero vi devas nepre kaj ĉiam anonci ĉe la statistikaj instancoj de nia movado la detalojn de ĉiu via lerneja kurso. Eĉ la eminentuloj.

Estas tute nekompreneble por mi, kial ĝuste la instruistoj ne povas aŭ ne volas kompreni, kian rolon en nia laboro ludas la ciferoj. Ciferoj ja en la epoko de la kosmaj flugoj, laseroj kaj cibernetiko prezentas la nerefuteblan argumenton, sur kies bazo ni povas firme ekstari kaj eĉ postuli la rekonon de niaj proponoj. La ciferoj ĝuste estas nia armilaro plej konvena kaj plej efika. Nia horizonto fariĝas ĉiam pli kaj pli serena. Sed la venko ne estas ankoraŭ proksima, kaj ne povas esti proksima sen nia pena, streĉa kaj senlaca laboro. Sed laboro ne unutaga, unu-sezona aŭ unuokaza, sed seninterrompa ĉiutaga kaj tutjara laboro de ĉiu instruisto en ĉiu lando sur ĉiu posteno. Nur 23 000 instruistoj ĝis nun subskribis la Proponon al UN. Ĉu la cifero kontentigas vin? Ĉu ni absolute ne povas prezenti pli imponan . . . pli veran kaj pli konvinkan nombron da subskriboj de niaj gekolegoj? Eĉ hodiaŭ ankoraŭ estas tempo. Kolektu do kaj sendu. Ne hezitu. Komprenu ĉiam la valoron de la ciferoj.

Kaj utiligu la eblecojn, kiujn donas la kono de Esperanto, ĉar tio estas la plej taŭga argumento en la "senpera batalo". La korespondado de gelernantoj, la interŝanĝado de spertoj, la reciproka vizitado en la lernejoj, aranĝado de interlandaj lerneaj konkursoj ktp — jen la faktoj, per kiuj vi povos okulfrape pruvi la utilecon de Esperanto, kaj en nia laboro multege helpi.

Per tiuj kelkaj frazoj mi volis iamaniere mobilizi vin al la laboro, kiu nin atendas ankoraŭ. Al laboro, kiun atendas la tuta esperantistaro, kaj kiun postulas de ni la grandeco de la zamenhofa verko.

LA DUA KONFERENCO DE LERNEJOJ EN

KIUJ ESPERANTO ESTAS INSTRUATA

23/VII — 28/VII 1966

Studenta Hejmo, Elisabethstr. 93, Graz,
Aŭstrujo

La temaro de la prelegoj:

- a) La Asociiĝintaj Lernejoj de Unesko kaj la ebla rolo de la Internacia Lingvo. (Prof. d-ro Ivo Lapenna)
- b) La decidoj de la Beograda Konferenco, formiĝo de KKL kaj ĝia laboro. (Peter

Zlatnar)

- c) La eduka valoro de la instruado de Esperanto en la lernejoj. (Raif Markarian)
- d) La rolo de TEJO en la lernejo. (Svobodan Zlatnar).

Oni antaŭvidas ankaŭ multon da aliaj fakaj prelegoj, kies titolojn ni donos en la sekvonta numero de la bulteno.

Ni ricevis la proponon de s-ro E. Linnuse el Tallin (Estonujo) presi liston de vortoj, kiujn oni devas instrui en la elementa kurso de Esperanto. Li informis nin, ke li kun kolegoj-instruistoj elektis la vortojn, kiujn oni devas nepre konigi al gelernantoj dum la elementa kurso de E. Dum la laboro ili studis la liston de Leo Blaas pri la ofteco de vortoj (en decembra numero de "Esperanto", 1964), kaj konstatis, ke multaj, por la kursoj speciale necesaj vortoj, mankas en la listo. Ni dankas al la gekolegoj el Tallin kaj speciale al s-ro Linnuse pro ilia laboro, kaj volonte ni presas la liston, kvankam en kelkaj kazoj ni havis la dubon, ĉu ĉiuj estas nepre necesaj. La prijuĝon ni lasas al la kolegoj, kiuj interesiĝos pri la listo. Sed, por ke la listo povu servi ankaŭ al kolegoj, kiuj kuraĝus verki novan libron por elementa kurso en la lernejoj, pli precize en popollernejoj, ni permesis al ni kompletigi la liston per la vortelementoj, kiuj eble ne estas necesaj dum la vesperaj kursoj por plenkreskuloj, sed nepre neeviteblaj dum la laboro kun infanoj. Kompreneble nia kompletigo estas nur supraĵa kaj enhavas nur la vortojn, kies manko estis tre okulfrapa.

La listo enhavas 600 vortradikojn kaj 109 gramatikaĵojn. Al tiu provizo ni aldonis ankoraŭ 40 vortelementojn. Por ne ĝeni la aŭtorojn ni presas ilin post la teksto sendita al ni de s-ro Linnuse.

Listo de 600 vortradikoj por

Elementa Esperanto-Kurso

Aĉet-, adres-, aer-, afabl-, afer-, ag-, aĝ-, akompan-, aktiv-, akv-, al, ali-, alt-, am-, ambaŭ, amik-, amuz-, ankaŭ, ankoraŭ, atend-, atent-, aŭ, aŭd-, aŭgust-, aŭskult-, aŭtun-, avid-, av-;

babil-, baldaŭ, bat-, batal-, bel-, best-, bezon-, bild-, bilet-, bird-, blank-, blov-, blu-, bon-, bov-, brak-, bril-, brul-, brun-, buŝ-, buter-;

cel-, cent, centr-, cert-, ci, cifer-;

ĉambr-, ĉapel-, ĉar, ĉe, ĉef-, ĉes-, ĉeval-, ĉiel-, ĉirkaŭ, ĉokolad-, ĉu;

da, danc-, dank-, dat-, daŭr-, de, decembr-, decid-, dek, dekstr-, demand-, des, dev-, dezir-, dik-, diligent-, dimanĉ-, direkt-, dir-, divers-, do, dolĉ-, dolor-, dom-, don-, dorm-, du, dum;

eĉ, edz-, egal-, ekster, ekzamen-, ekzempl-, ekzerc-, el, elekt-, en, erar-, esper-, est-, estim-, etaĝ-;

facil-, fajr-, fal-, fam-, famili-, fart-, februar-, feliĉ-, fenestr-, ferm-, fest-, fidel-, fil-, fin-, fingr-, fiŝ-, flank-, flav-, flor-, flu-,flug-, foj-, font-, foli-, for, fork-, forges-, form-, fort-, frap-, frat-, fraz-, freŝ-, fru-, frukt-;

gaj-, gast-, gazet-, glas-, grand-, gratul-, grav-, griz-, grup-;

ĝarden-, ĝeneral-, ĝi, ĝis, ĝoj-, ĝust-;

halt-, haven-, hav-, har-, hejm-, help-, herb-, hero-, hieraŭ, himn-, histori-, hodiaŭ, hom-, honest-, hor-, horloĝ-, hotel-, humor-, hund-, ĥor-;

ide-, ili, infan-, inform-, instru-, inter. interes-, invit-, ir-;

ja, jam, januar-, jar-, je, jen, jes, ju, juli-, jun-, juni-;

jaŭd-, jet-, ĵurnal-, ĵus;

kaf-, kaj, kajer-, kalkul-, kamarad-, kant-, kamp-, kap-, kapabl-, kar-, kat-, ke, kelk-, kin-, kis-, klar-, klas-, kart-, klub-, knab-, kok-, kolekt-, kolĥoz-, kolor-, komb-, komenc-, komitat-, kompren-, komun-, kon-, kongres-, konsent-, konsil-, konsist-, konstru-, kontraŭ, kor-, korekt-, korespond-, korp-, kort-, kosm-, kost-, kovr-, krajon-, kresk-, kret-, kri-, kred-, krom, kuler-, kun, kur-, kurac-, kuraĝ-, kuŝ-, kuz-, kvankam, kvazaŭ, kvin;

labor-, lac-, lakt-, land-, lamp-, larĝ-, las-, last-, laŭ, laŭd-, lav-, lecion-, leg-, lern-, leter-, lev-, li, liber-, libr-, lig-, lingv-, lit-, litr-, loĝ-, long-, lud-, lum-, lok-, lun-, lund-;

magazen-, maj-, malgraŭ, man-, manĝ-, mar-, mard-, manier-, marŝ-, mart-, mastr-, maten-, mebl-, mem, memor-, merkred-, met-, metr-, mez-, mi, mil, milit-, minut-, mir-, mol-, mon-, monat-, mond-, mont-, morgaŭ, mort-, mov-, mult-, mur-, muze-, montr-, muzik-;

naci-, najbar-, nask-, natur-, naŭ, naz-, ne, neces-, neĝ-, nek... nek, nepr-, nest-, ni, nigr-, nokt-, nom-, nombr-, nord-, nov-, novembr-, nub-, nul-, numer-, nun, nur;

objekt-, ofic-, oft-, ok, okaz-, okcident-, oktobr-, okul-, oni, onkl-, organiz-, or-, ord-, orel-, orient-, ov-;

pac-, pag-, paĝ-, pan-, paper-, pardon-, parenc-, parol-, part-, parti-, pas-, paŝ-, patr-, patri-, pec-, pen-, pionir-, plaĉ-, pens-, per, perd-, person-, permes-, pet-, pez-, pied-, plafon-, plank-, plen-, plezur-, plor-, plu, plum-, pluv-, po, pom-, pont-, popol-, por, pord-, port-, post, poŝt-, poŝ-, pov-, prav-, pren-, prepar-, preskaŭ, pret-, preter, prezent-, prezid-, pri, printemp-, pro, profesii-, profund-, proksim-, promen-, propon-, prov-, proverb-, punkt-, pur-;

radi-, radik-, rajt-, rakont-, rapid-, raport-, regul-, rekomend-, rekt-, renkont-, respond-, rest-, ricev-, riĉ-, revu-, rid-, rigard-, ripet-, ripoz-, river-, rond-, roz-, ruĝ-;

sabat-, saĝ-, sak-, sal-, salt-, salut-, sam-, san-, sang-, sap-, sat-, sci-, scienc-, se, sed, saĝ-, sek-, sekv-, sekund-, semajn-, sen, send-, sep, septembr-, serĉ-, serv-, ses, sent-, sezon-, si, sid-, signif-, silent-, simpl-, sinjor-, skrib-, soif-, sol-, somer-, sovet-, staci-, star-, stel-, start-, sub, subit-, sud-, sufer-, sufiĉ-, sukces-, suker-, sum-, sun-, sup-, super, supr-, sur;

ŝajn, ŝanĝ-, ŝat-, ŝi, ŝip-, ŝlos-, ŝrank-, ŝtat-, ŝton-;

tabl-, tabul-, tag-, tamen, tas-, task-, te-, teatr-, teler-, temp-, ten-, ter-, tim-, tra, traduk-, traf-, tranĉ-, trankvil-, trans, tre, tri, trink-, tro, trov-, tuj, tuk-, tuŝ-, tut-;

uni-, unu, urb-, util-, uz-;

vagon-, varm-, vek-, ven-, vend-, vendred-, vent-, ver-, verd-, verk-, vesper-, vest-, veter-, vetur-, vi, viand-, vid-, vilaĝ-, vintro-, vir-, viv-, vizaĝ-, vizit-, voĉ-, voj-, vojaĝ-, vol-, vort-, zorg-.

109 gramatikaĵoj por
Elementa Esperanto-Kurso
 Gramatikaj finaĵoj: -a, -as, -e, -i, -is, -j, -n, -o, -os, -u, -us.
 Gramatikaj sufiksoj: -ant-, -at-, -int-, -it-, -ont-, -ot-.

Afiksoj: -aĉ-, -ad-, -aj-, -an-, -ar-, bo-, -ĉj-, dis-, -ebl-, -ec-, -eg-, -ej-, -ek-, -eks-, -em-, -end-, -er-, -estr-, -et-, -fi-, ge-, -id-, -ig-, -iĝ-, -il-, -in-, ind-, -ing-, -ism-, -ist-, mal-, mis-, -nj-, -obl-, -on-, -op-, pra-, re-, -uj-, -ul-, -um-.

Korelativoj: io, iu, ia, ie, ies, iel, ial, iam, iom, — kio, kiu, kia, kie, kies, kiel, kial, kiam, kiom, — tio, tiu, tia, tie, ties, tiel, tial, tiam, tiom, — ĉio, ĉiu, ĉia, ĉie, ĉies, ĉiel, ĉial, ĉiam, ĉiom, — nenio, neniu, nenia, nenie, nenies, neniel, nenial, neniam, neniom.

Vortetoj: ajn, ĉi, la, ol, plej, pli.

Adreso: Leningrado- D-28, poŝtkesto 360, Esperanto-klubo, lernmetoda sekcio.

Nia aldono: anas-, anser-, aŭtomobil-, banan-, ber-, blek-, boj-, bub-, bud-, bus-, butik-, cign-, cikoni-, citron-, ĉeriz-, elefant-, elektr-, fer-, kapr-, kolomb-, krokodil-, kunikl-, leon-, lepor-, mus-, muŝ-, nud-, orangĝ-, preĝ-, pir-, pup-, prun-, reĝ-, sciur-, simi-, ŝtup-, vapor-, vin-, uniform-, zum-.

MALLONGAJ INFORMOJ

Dum la instruista semajno en Graz pasint-somere estis prilaborita kaj voĉdonita la nova statuto de ILEI. ● La Komitato de ILEI decidis fari kontrakton kun aperantaj en Jugoslavio "Internaciaj Pedagogiaj Kajeroj" kun pure pedagogia enhavo, ke ili nun aperadu sub la aŭspicio de ILEI. ● Ĝis nun deĵoranta kasis-tino de ILEI s-ino Alide Leider pro malsano eksiĝis, transdonante la oficon al nove-elektita anstataŭantino f-ino Dora Andersson, Västra Vägen 16, Linköping, Svedujo. ● En Graz oni decidis inviti al la Konstanta Komisiono pri Lernejoj reprezentanton de ILEI. La komitato de tiu organizaĵo elektis por tiu funkcio la prezidantinon f-inon J. Dedieu, 26, Ave. de l' U.R.S.S., Toulouse, Francujo. ● La Pedagogia Grupo de Instruistoj el Szeged en Hungarujo aranĝis ĉi-jare inter 10 kaj 20 de aŭgusto tendaron, dum kiu okazis kurso por komen-cantoj kaj ankaŭ por instruistoj. Partoprenis 350 personoj, inter kiuj pli ol duono estis eksterlandanoj. Multaj instruistoj partoprenis la finan ekzamenon. Prelegis A. Sekelj, d-ro Jaky kaj prof. A. Pechan. ● Dum la feriaj kursoj en julio 1965 por direktoroj de teknikaj mezlernejoj en Pollando en Gdańsk, aranĝitaj de Ministerio de Edukado, prof. Toczyski pre-legis pri Esperanto dufoje dum du horoj, vekante grandan ekinteresiĝon inter la geaŭs-kultantoj. Post la prelego oni disvendis inter ili multaj esperantaj lernolibroj kaj vorta-rojn. La prelegoj estis pagitaj de la Minis-terio. ● La 28 kaj 29 de decembro ĉi-jare okazos en Varsovio Tutpollanda Konferenco de Esperantistaj Instruistoj. Dum la Konfe-rencio oni priparolos diversajn pedagogiajn kaj organizaajn demandojn.

Raif Markarian

LISTO DE LIBROJ REKOMENDITAJ POR LERNEJA UZO — DUA ALDONO

(Vidu "Lerneja Bulteno" junio 1964 kaj junio 1965)

A. ELEMENTAJ LERNEJOJ

Legolibroj

ibd/3 "Fajro! Fajro!" (skota) 9 teatraĵetoj. (Taŭgas ankaŭ por duagrada lernejoj, ves-perklaso kaj kluboj) 3 st.

ilbd/2 "Sub la ĉielo" (brita) Diversnaciaj po-polkantoj kun arioj. (Taŭgas ankaŭ por dua-grada lernejoj ktp.) 3 st.

B. DUAGRADAJ LERNEJOJ

Lernolibroj

Rekta metodo: "Privilegia Vojo" 13 st.

Legolibroj

ilbd/1 "Tri oraj haroj de l'Diablo" Tri fabeloj de Grimm. 3 st.

ilbd/2 "El la vivo de Ludoviko Zamenhof" (sveda) Simpla biografio. 8 st.

ilbd/3 "Tri majstroj" (sveda) Biografioj de Stradivarius, Paganini kaj Smetana. 8 st.

"Sub la nobla ĉevalo" (pola) Detektivrakonto. 1,25 st.

"Gaŭŝutun kaj Nannona" (ĉina) bildrak. 4 st.

"Tiaj ni estas" 29 rakontoj. 28,8 st.

Porinstruistaj libroj

"Kiu kion scias?" Demandoj kaj respondoj pri la Esperanto-movado. 2 st.

"La fontoj de Esperanto" (Gregor) 4 st.

Disko

"Ni kantu en Esperanto" Popolkantoj, versaĵo, distra monologo. Kun teksto. 33 t/m. 58 st.

1-a Internacia Konferenco de Lernejoj en Kiuj Esperanto estas Instruata.

Ankoraŭ restas ĉe la eldonistoj sufiĉe multaj ekzempleroj de la tuta dokumentaro de la Konferenco. Mendu kun antaŭpago de 10 ŝilin-goj (20 Int. Resp. Kuponoj) ĉe: R. Markarian, 2 Hazel Grove, Chorley, Lancs, Britujo.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ (KKL)

Generalaĵoj kaj rilatoj kun internaciaj instancoj: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx Britujo. Anstataŭanto: S-ro Józef Toczyski, estrarano de UEA pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

Reprezentanto de ILEI: F-ino Jeanne Dedieu, 26 Ave. de l' U.R.S.S., Toulouse, Francujo.

Rilatoj kun profesiaj instruistaj organizaĵoj: S-ro E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm, Svedujo.

Pedagogiaj demandoj: S-ro R. H. M. Markarian, 2, Hazel Grove, Hartwood Park, Chorley, Lancs., Britujo; tel. 4572

Organizaj demandoj: S-ro P. Zlatnar, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Bonvolu ĉiam turni vin al la kompe-tenta membro laŭ la supraj indikoj.

REVUO

ESPERANTO

INTERNACIA

58 a Jaro

1965

Redaktoro :
D-ro V. Sadler

Oficiala organo de
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Indekso 1965

Afriko	68,	206	
Agrokulturo	14,	206	
Akademio	59,	79	
Alfabetoj, analfabeteco	68,	148	
Antikvaj lingvoj	121, 122,	194	
Arabujo		149	
Arkitekturo		85	
Arto		67	
Aŭstrujo	33, 85, 95, 101, 135, 160, 174,	193,	218
Aŭtomobilistoj	14,	33,	218
Azio	114,	206	
Belartaj konkursoj: vidu: "Konkursoj"			
Belgujo	75,	116,	152
Bibliaj studoj		218	
Biologio	150,	206	
Blinduloj		193	
Brazilo	16, 46, 135, 157,	192,	193
Britujo	108, 116,	135,	193
Bulgarujo	16, 33, 76, 93, 135, 154, 156,	193,	220
	196,		
CED: Dokumentoj	52, 130, 131, 132,		214
Lernejoj			214
Lokaj societoj			10
Nobel-premio por paco			70
Radio-elsendoj en 1964			70
Sciencistoj-esperantistoj			130
UEA en internacia konferenco			52
Universitatoj			214
Ciferoj, Esperanto en			89
Citaĵoj	5,	32,	189
Cseh-jubileo		176,	185
Ĉeĥoslovakujo	14, 84,	93,	114
Ĉinujo			154
Danlando	51, 93,	165,	176
Delegita servo			21
Dokumentado			5
Domo de UEA			221
Ekzameno internacia	36,	59,	169
Eldonaĵoj laŭ titoloj:			
Aktuala situacio			112
Amata voĉo de d-ro H. Jagi			91
Aŭtografoj de d-ro Zamenhof			215
Bazaj faktoj pri la Int. Lingvo			132
Bestkalendaro 1965			32
Biblia revuo			218
Boulogne 1905			215
Ĉina revolucio kaj la KPC			112
Daŭrigu la lukton			191
El Afriko			113
El la vivo de L. Zamenhof			112
El tero kaj etero			134
Esperantistoj estas ni			190
Esperanto — moderna lingvo			153
Esperanto the aggressor language			188
"Espero, la" (disko)			91
Fabeloj de Andersen vol. I			188
Fajro! Fajro!			113
Fiera generalo			13
Floroj de l' malbono			134
Frisaj rakontoj			12
Godelieve, la nobelino de Gistelo			73
Gramofondisko Qualiton			73
Granda venko de leninismo			191
Grande dicionário E-português			13
Ĝaŭŝutun kaj Nannona			32
Hamleto			71
Historia sperto de la kontraŭfaŝisma milito			191
Homaranismo de d-ro Zamenhof			215
Idetoj			92
Impresoj per Esperanta vojaĝo (disko)			91
Initiation théorique			132
Internacia elektroteknika terminaro			188
Islandaj pravoĉoj			133
Japanaj malnovaj rakontoj			190
Japana kvodlibeto			190
Jen estas helpo por vi			153, 190
Kalevala			110
Kantante tra Pollando			190
Kaŭkazaj rakontoj			72
Kemio internacia	55, 154,		216
Kial Ĥruŝĉov falis			54
Kiamaniere disvastigi Esperanton			112
Kiel esti amata			73
Kion vi faras			92
Komento pri la marta kunveno			134
Konciza geografio de Ĉinio			71
Konstitucio de la regno Japanio			72
Kredo al Dio en la atomepoko			217
Kvin fratoj			13
Kvinteto			91
Leteroj el Sudvjetnamio			54
Libro de la mediumoj	73,		112
Libro de teo			132
Maŝinmondo			31
Mekanikaj terminoj			92
Meze de l' flamoj			112
Mia poŝhorloĝo			12
Monda kulturo	115, 133,		189
Ne tiel, sed tiel ĉi!			191
Ni parolu Esperanton			12
Norvega bibliografio			32
Nos premiers pas en Esperanto			32
Novaj vestoj de la imperiestro			53

<i>Panjo</i>	189	Hejma uzo de Esperanto	26
<i>Parolado en Aliarcham</i>	191	Hispanujo	17, 64, 114, 135, 136, 154
<i>Perspektivoj</i>	54	Homaj rajtoj	102
<i>Petr Bezruč</i>	112	Hungarujo	14, 45, 75, 93, 157, 193, 212
<i>Pri kontraŭdiro</i>	73	Ideologio	141
<i>Pri la pseŭdokomunismo de Ĥruščov</i>	112	Informado (vidu ankaŭ CED)	23, 42, 108, 112, 128, 170, 202
<i>Priručnik za konverzaciju</i>	216	Instruado	23, 26, 121
<i>Proleta revolucio</i>	13	Instruistoj (vidu ankaŭ "Lernejoj")	9, 45
<i>Raciaj derivoj kaj verbuzoj</i>	112	Internacia ekzameno	36, 59, 169
<i>Rememoru la venkon</i>	191	Internacia Esperanto-Instituto	185
<i>Report on the teaching of Esperanto</i>	216	Internaciaj konkursoj: vidu "Konkursoj"	
<i>Revuo "Esperanto"</i>	89, 131	Internacia Somera Universitato	96, 102, 127, 142, 169
<i>Soifo</i>	53	Irlando	135
<i>Sorto de homo</i>	217	Israelo	33, 75, 93, 146, 148, 218
<i>Sub la nobla ĉevalo</i>	13	Italujo	45, 135, 154
<i>Sur la vivovojo</i>	189	Japanujo	6, 14, 28, 30, 67, 75, 105, 126, 135, 136, 161, 193, 218
<i>Terminaro de kemiaj afiksoj</i>	153	Jaro de Internacia Kunlaboro (JIK)	
<i>Turo inter nuboj</i>	91	1, 2, 11, 25, 43, 63, 84, 105, 108, 125	
<i>Vojoj de la Eklezio</i>	217	144, 152, 165, 166, 171, 176, 184, 205	
<i>Volvotigo de amikeco</i>	215	Jubileo Cseh	176, 185
<i>Vortludoj</i>	113	Jugoslavio	136, 182
<i>Zamenhof en sia tempo (serio)</i>	215	Juna Vivo, La	
Eldonaĵoj por lernejoj	109, 212	16, 34, 58, 76, 94, 116, 136, 156, 172, 196, 220	
Eldonaĵoj ricevataj		Junularaj kongresoj: vidu "Kongresoj"	
13, 32, 54, 74, 92, 113, 134, 153, 178, 191, 217		Junularaj kunvenoj en UK	166, 173
Elektaj	117	Junulara movado	61, 166
En la grupoj		Kalendaro	36, 96, 155, 195
17, 37, 57, 70, 95, 117, 129, 155, 219		Kanado	14
Esperanta flago	117	Kemio	55, 154
Esperanto en ciferoj	89	Kino	114, 135, 176
Estraraj decidoj	81, 161	Kolektado	193
Etiopio	14	Komerco	166
Eŭropa E-Konferenco: vidu "Kongresoj"		Komitato de UEA	164
Faktoj pri Esperanto	89	Konferencoj: vidu "Kongresoj"	
Familiaj nomoj	69	Kongo	14, 33, 55
FAO	206	Kongresoj kaj konferencoj:	
Federismo	193	50-a U.K., Tokio	15, 36, 55, 56, 78, 79, 95, 115, 155, 161, 219
Fervojistoj	14, 152	51-a U.K., Budapeŝto	195
Filatelio	135	21-a IJK, Ootŭ	58, 76, 116, 172, 195
Filmo "Angoroj"	114	22-a IJK, Pécs	197, 220
Filozofio	176	Postkongreso oficiala	15, 55, 78
Financoj	94, 201	10-a Infankongreseto	115
Finnlando	33	2-a Internacia Konf. de Lernejoj	44, 108, 181, 210
Fotografio	114	Eŭropa E-Konferenco, Vieno	15, 56, 101, 160, 174
Foto-konkurso: vidu "Konkursoj"		Internacia Oomoto-Festivalo	175
Francujo		Int. Seminario de GEJ	46, 91, 157
14, 16, 33, 76, 93, 114, 116, 135, 157, 218		Seminario de TEJO pri lingvaj problemoj	196
Genetiko	150	Int. Junulara Konf. Anne Frank	35, 58, 76
Geografio	55, 193	Nordlanda Kongreso, Oslo	33, 75, 152
Germanujo	14, 35, 46, 75, 76, 91, 114, 135, 154, 157, 193, 220	Fervojista Kongreso	152
Gronlando	51	Belga Kongreso	152
Generalaj kunvenoj de UEA	166		

Konkursoj kaj premioj:			Nekrologoj		
Argenta sprono de KOKO	168		13, 37, 54, 77, 95, 113, 131, 155, 176, 194,	218	
Belartaj	168,	195	Nobel-premio por paco	70	
Comella-Bassols	93,	218	Nomoj, kiel skribi	69	
Foto-konkurso	15, 55, 115, 168,	195	Norvegujo	33, 58, 75,	152
Internaciaj konkursoj			Nov-Zelando	109, 193,	221
	17, 38, 79, 119, 158, 178,	223	Oficiala informilo		
Oomoto	93,	175	19, 38, 59, 78, 97, 117, 137, 158, 179, 198,	221	
Oratoraj	168, 172,	195	Oratora konkurso: vidu "Konkursoj"		
Pri Malto		114	Oriento-Okcidento, intersanĝoj	166	
Konsulta Komisiono pri Lernejoj	45, 109,	212	Ornitologio	75	
Koreujo	14, 33, 58, 106, 117, 135,	136	Ortografio	69	
Kubo		135	Pacmovado	135	
Laborplanoj por JIK	2,	34	Politiko	176	
Landaj organizaĵoj		117	Pollando	33, 45, 75, 83, 135, 136,	212
Laseroj		88	Postkongreso: vidu "Kongresoj"		
Latinameriko		206	Poŝtmarkkolektado	37	
Leksikografio	75,	149	Premioj: vidu "Konkursoj"		
Lerneja Bulteno	44, 108,	210	Propono al UN: vidu "Jaro de Int. Kunlaboro"		
Lernejoj (vidu ankaŭ CED kaj "Instruistoj"):			Propaj nomoj	69	
	41, 51, 181, 194,	220	Radio 18, 37, 55, 59, 77, 83, 95, 117, 137,	155	
Leteroj	69, 89, 91, 131, 194,	219		176, 177, 192, 193, 218,	219
Libroj: vidu "Eldonaĵoj"			Radio-elsendoj en 1964	70	
Lingva problemo en Afriko	68		Recenzoj: vidu "Eldonaĵoj"		
en Gronlando	51		Religio	169, 175	
en komerco	166		Rezolucioj	152, 165, 166,	171
en la sveda parlamento	83		Ricevitaj eldonaĵoj: vidu "Eldonaĵoj ric."		
Lingvoj antikvaj, etnaj	121, 122, 126, 146, 186,	194	Rio de Janeiro 400-jara	48	
Literaturo (vidu ankaŭ "Eldonaĵoj"):			Rotario	75	
ĝenerale:	33, 55, 64, 93, 114, 135, 193,	218	Scienco	123	
araba: "La vivo de la amo" de Ĝibran'	213		Serva Centro de UEA	191	
japana: "Kvar hajkoj"	115		Skoltoj	94	
originala: "Pachinko" de G.G.P.	30		Somera Universitato: vidu "Internacia . . ."		
"Tankae" de P. Lobut	74		Sovetunio	14, 75, 93,	218
"Tankaoj okcidentaj" de P. Lobut	192		Stafeto-jubileo	64	
Literoftecoj		194	Studentoj	16, 157,	196
Lokaj societoj (vidu ankaŭ "En la grupoj"):			Svedujo	55, 83, 93, 154,	218
	10, 22, 42, 62, 82, 182,	202	Svisujo	154, 193,	218
Madagaskaro	16, 116,	220	Teatro	55,	167
Magnetofona servo		219	TEJO: vidu "Junularo"		
Mallongaj novaĵoj 14, 33, 55, 75, 93, 114, 135,	218		Teksaĵindustrio	154	
Malsato	206		Telekomunikado	88	
Malto	75,	114	Tokio	6	
Medicino	75		Turismo	33, 55, 75,	176
Membraro	201,	221	Unesko	5, 68,	166
Membro-statistiko	38,	56	Universitatoj	9,	214
Memoriga kalendaro: vidu "Kalendaro"			Unuigintaj Nacioj (vidu ankaŭ Jaro de Int.		
Mendel, Gregor	150		Kunlaboro)	33, 75, 101, 102, 114, 142,	206, 218
Mondcivitanoj	93		Usono	9, 33,	55
Mongolujo	75		Varbado	201,	221
Monumento Linz	160,	193	Venezuelo	14	
Movado ĝenerale	141		Vieno	85	
Muziko	14,	219	Vjetnamujo	176	
Nederlando	93, 176, 185, 193,	218	Vortaro	149,	211

De la eminenta sira poeto-artisto Ĝibran' Ĥalil' Ĝibran' (1883-1931) jam aperis en la Internacia Lingvo la verko "La profeto" (Stafeto, 1962). El sia patrolando Libano Ĝibran' elmigris al Usono, kie li konatiĝis sub la nomo Kahlil Gibran per anglalingvaj verkoj, i.a. "La profeto". La nun prezentata elaraba traduko estas unu el fasko da prozpoemoj kaj rakontoj elektitaj kaj tradukitaj de George Abraham.

La Printempo.

Ni iru, amatino mia, iradi inter la monumantaj ruinoj, ĉar la neĝo jam degelis, kaj la vivo revigliĝas el sia dormo kaj ĝi sin movetas tra valoj kaj montodeklivoj. Iru kun mi por sekvi la paŝosignojn de la printempo tra la malproksima kamparo.

Venu suriri la altajn suprojn kaj rigardi la svarmadon de la verdaj ebenaĵoj ilin ĉirkaŭantaj.

Jen la aŭroro printempa jam sternis mantelon, kiun forfaldis la vintraj noktoj; per ĝi vestiĝinte, la prunuoj kaj pomarboj ŝajnas fianĉinoj en sia edziniĝonokto. La vinberarboj vekigis kaj iliaj branĉoj sin ĉirkaŭpremas kvazaŭ karesemaj geamantoj.

La riveretoj kuradas dancante inter la ŝtonegoj, ripetante la kantaĵojn de la gajeco; la floroj ŝprucis el la koro de la Naturo, same kiel el la maro elŝprucas la ŝaŭmoj.

Venu trinki kun mi la restaĵojn de la pluvolarmoj el la narciskalikoj; plenigu niajn animojn per la kantado de la ĝojantaj birdoj kaj profitu la enspiradon de la parfumaj zefiroj.

Eksidu ni apud tiu ŝtonego, kie sin kaŝas la violoj, kaj tie ni interŝanĝu amajn kisojn.

La Somero.

Iru ni al la kampo, karulino mia, ĉar la tempo de l' rikolto jam alvenis, kaj la varma amo de la suno al Naturo jam maturigis la elkreskintan grenon.

Venu antaŭ ol la birdoj neniigos nian penadon kaj la formikaro invados nian teron.

Ni iru rikolti la frukton de la tero, same kiel la animo rikoltas grajnojn de la feliĉo el la semoj de tiu lojaleco, kiun la Amo enplantis en la profundojn de niaj koroj.

Ni iru plenigi la tenejojn per la produktaĵoj de la materioj kiel la vivo plenigis la grenejojn de niaj sentimentoj.

Ni kuŝiĝu, kunulino mia, sur la herbetaron, kaj kovru ni per la firmamento; ni apogu niajn kapojn sur faskojn de delikata pajlo kaj ripozu je la taglaboro, aŭskultante la konversaciadon de la vala rivereto.

La Aŭtuno.

Ni aliru la vinberarbejon, amatino mia, por premadi la vinberojn kaj konservi ilin en la vazojn, same kiel la animo garde entenas la sciadon de la jarcentoj; ni kolektu la sekajn fruktojn kaj distilu el la floroj.

Ni revenu hejmen, ĉar la arbofolioj jam paliĝis, kaj la vento ilin disblovis kvazaŭ pretendante igi ilin mortotuko por envolvi la florojn mortintajn pro malĝojo korprema, kiam ilin adiaŭis la somero.

Venu, ĉar la birdoj formigris al la marbordo forportante kun si la gajecon de la ĝardenoj, kaj postlasis tedan solecon por la jasmeno kaj lilio, kiuj ploras verŝante larmojn sur la vangon de la tero.

Ni revenu, ĉar la riveretoj jam ĉesigis sian kuradon, la fontoj forviŝis siajn larmojn, kaj ruinoj deĵetis la solenajn vestojn.

Venu, amatino mia, ĉar la Naturo estas konkerata de la dormemo, kaj jen ĝi adiaŭas la vekitecon per melodie emociaj kantoj.

La Vintro.

Proksimeniĝu, kunulino de mia vivo! Proksimiĝu kaj ne permesu ke la neĝaj spiroj disigu niajn korpojn. Sidiĝu apud mi ĉe jena fajrujo, ĉar fajro estas bongusta frukto de la vintro.

Raportu al mi pri la venontaĵoj de la jarcentoj, ĉar miaj oreloj estas lacigataj de la veado de la vento kaj de la lamentado de la elementoj.

Riglu la pordon kaj la fenestrojn, ĉar la aspekto de la kolerema ĉielvizaĝo malgajigas mian animon, kaj la rigardo al la urbo — kuŝanta kvazaŭ nekonsolebla patrino sub la neĝtavoloj —, sangigas mian koron.

Enverŝu oleon en la lampon, ho kunulino de mia vivo!, ĉar ĝi preskaŭ estingiĝas, kaj metu ĝin apud vin por ke mi vidu tion, kion la noktoj skribis sur via vizaĝo...

Alportu la vinujon; ni trinku kaj rememoru la tagojn de la vinberpremado.


Alproksimiĝu! Proksimiĝu al mi, ho amatino de l' animo mia, ĉar la fajro estingiĝis kaj la cindro tutkovris ĝin... Ĉirkaŭprenu min, ĉar la lampo jam senlumiĝis kaj ĝin forvenkis la senlumeco... Niaj palpebroj tropeziĝis pro la ebrieco de la jaroj...

Rigardu min per okuloj ombrumitaj de la dormemo... Ni ĉirkaŭprenu unu la alian, antaŭ ol nin ĉirkaŭprenos la malvekiĝo...

Kisu min, ĉar la neĝo jam invadis ĉion, escepte viajn kisojn...

Ha!, amatino mia, kiel profundega estas la maro de la dormo!

Ha! Kiel malproksima estas la aŭroro... en ĉi tiu mondo!



Ĝ. Ĥalil' Ĝibran'

ENKETO PRI KATEDROJ KAJ LEKTORATOJ DE ESPERANTO

CED entreprenas novan enketon pri ĉiuj katedroj, lektoratoj kaj kursoj en la universitatoj kaj samrangaj altlernejoj por la jaro 1965/1966. La enketo celas kolekti informojn pri jenaj punktoj:

1. Katedro, lektorato aŭ alispeca kurso; 2. Dekreto aŭ alia dokumento, per kiu la instruado estas enkondukita (numero kaj dato); 3. Ĉu la instruado estas deviga aŭ nedeviga?; 4. Ofteco de la prelegoj; 5. Ĉu la gestudentoj estas ekzamenataj, ĉu la ekzamenoj estas devigaj aŭ ne?; 6. La nuna profesoro, lektoro aŭ alia instruisto kun preciza adreso.

En la nomo de CED la enketon faras ĝia kunlaboranto *Prof. J. Régulo-Pérez, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kanariaj Insuloj.*

Ĉiuj profesoroj, docentoj, lektoroj aŭ aliaj instruistoj, kiuj instruas Esperanton en la universitatoj aŭ samgradaj altlernejoj en oficialaj kursoj estas petataj tuj rekte kontakti *prof. J. Régulo-Pérez* kaj doni al li la necesajn informojn.

CED deziras kompletigi tiun ĉi enketon kiel eble plej baldaŭ, sed nepre antaŭ la fino de majo 1966, por ke dokumentita trarigardo povu esti prezentita al la Dua Lerneja Konferenco en Graz.

INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJ EN 1965/1966

Kiel konate, ekde sia fondiĝo en 1952, CED dediĉis grandan atenton al la evoluo de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj. Pri tiu demando CED entute publikigis 10 dokumentojn en la Serio B/IV. Rilate la nombron de lernejoj, en kiuj la lingvo estas instruata, CED faris enketojn kaj publikigis dokumentojn por la lernejaj jaroj 1955/56, 1959/60 kaj 1962/1963. Tiuj dokumentoj montris la vastigon de la instruado de Esperanto en la lernejoj.

Nun necesas fari novan enketon pri la lerneja jaro 1965/1966. Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj esprimis la deziron, ke ĉifoje la enketon faru ILEI kaj ne CED. Laŭ la letero de la prezidantino de ILEI, f-ino Jeanne Dedieu, de la 28-a de septembro 1965, la enketon faros la vicsekretario de ILEI, s-ro O. Olsson, Bantorget 3, Lund, Svedujo.

CED volonte transdonas tiun taskon al ILEI kaj petas ĉiujn geinstruistojn, kiuj instruas Esperanton en la lernejoj, doni sian plenan helpon al s-ro Olsson. CED ankaŭ esperas, ke tiu ĉi enketo estos ĝustatempe finita, tiel ke ILEI povos prezenti la rezultojn en formo de

kompleta raporto al la Dua Lerneja Konferenco en Graz.

DU NOVAJ DOKUMENTOJ DE CED

La 15-an de septembro aperis la dokumento E/IV/3 "Apliko de Esperanto en Sciencaj kaj Fakaj Periodaĵoj". La dokumento estas publikigita en Esperanto kaj en la angla. En oktobro aperis la dokumento D/I/4 "Pri la Tradukado de Poezio", studo de William Auld, M.A. Ankaŭ tiu dokumento aperis en Esperanto kaj en la angla. La dokumento pri la tradukado de poezio, kune kun la antaŭa studo de W. Auld "Esperanto kiel Literatura Lingvo" (Dok. D/I/3), prezentas valoregan materialon kaj efikajn argumentojn sur tiu ĉi speciala kampo. CED varme rekomendas la utiligon de tiuj dokumentoj por publikigo de nacilingvaj studoj aŭ artikoloj pri la temo en literaturaj revuoj.

CED-DOKUMENTOJ EN NACIAJ LINGVOJ

Kiel anoncote pli frue, la dokumento CED/7, unue publikigita en Esperanto sub la titolo "Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo", aperis poste en la angla traduko en 2000 ekzempleroj, en la eldono de CED. Hispana Esperanto-Federacio prizorgis la eldonon de CED/7 ankaŭ en la hispana lingvo. La pola junulara gazeto "Tamen" ĵus publikigis ĝin en la pola.

La dokumento A/II/1 "La Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj" publikigita pli frue en Esperanto kaj en la angla, nun aperis, en mallongigita formo, en la flandra lingvo en la revuo "De Schakel", Antwerpen, oktobro 1965.

Donacoj por CED	£ s. p.
La stato je la 4-a de junio 1965 . . .	64- 7- 4
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
D-ro H. Kunzel, Germanujo	10-10
S-ro S. de Weerd, Nederlando	9- 0
S-ro U. P. Roland, Kanado	13- 2
S-ro E. F. Dean, Britujo	15- 0- 0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando . . .	10- 5
Argentina Esperanto-Lernejo, Rosario	3- 0- 0
S-ro M. J. Andersen, Danlando	14- 6
S-ro E. F. Dean, Britujo	5- 0- 0
S-ino Barbara Tribe, Britujo	15- 0
D-ro H. Kunzel, Germanujo	1-10
D-ro A. Albault, Francujo	11- 0
Novzelanda Esperanto-Asocio	5- 0- 0
Stato je la 31-a oktobro 1965	£ 101-13- 1

Tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Ĉifoje CED deziras aparte emfazi la donacon de Novzelanda Esperanto-Asocio, ĉar ĝi estas la sola landa Asocio, kiu konstante, de jaro al jaro, kontribuas por la laboro de CED. Se ĉiuj landaj asocioj agas same, CED povus ankoraŭ vastigi sian laboron. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

ABONU LA CED-DOKUMENTOJN !

La volvotigo de amikeco, de Soiĉi Hori. Eld. Gunma-Esperanto-Societo, Japanujo, 1965. 89 p. 21 × 15 cm., il. 9,25 gld. *

Malantaŭ la iomete mistera titolo kaŝas sin 17 interesaj skizoj pri plej diversaj temoj el la vastaj kampoj de botaniko kaj zoologio. La aŭtoro estas profesoro pri botaniko de Gunma-Universitato, kaj la skizoj aperis en la japanaj "Revuo Orienta" kaj "Oomoto".

La priskriboj estas vigle rakontitaj, ili estas saturitaj de amo al la naturo kaj, plej ofte, bazitaj sur propraj travivaĵoj, spertitaj kun la kompetenteco de sciencisto, tute evidente samtempe humanisto. Ĉio ĉi donas la atmosferon.

La temoj estas elektitaj pli malpli hazarde. Traleginte la libron oni tamen konstatas, ke ĝi tuŝas esencajn trajtojn de tiuj sciencoj, el kiuj ĉerpiĝis la materialo. Vere, ke kelkaj skizoj nur rakontas pri observetoj de naturamantoj pri pecoj de la naturo vartataj en la hejmo: floroj kreskigitaj el semo interŝanĝita inter la japana aŭtoro kaj norvega korespondamiko (norvega *Cobaea scandens* en Japanujo, japana farbito en Norvegujo — jen "la volvotigo de amikeco"); knabo, kies psikaj malfacilaĵoj en la lernejo venkiĝas, kiam li kaptas kankrojn kaj vartas ilin en la hejmo kaj la lernejo; aŭ la vitra akvujo kun tropikaj fiŝoj en la laboratorio de la aŭtoro — ĉi tiel li ja montras, kiel ni povas venigi la naturon al nia domo, ekzerci nian observemon kaj ĝui ĉiam aliajn aspektojn de la vivo.

Sed kiam ni legas pri la maniero, kiel torf-

kampoj formiĝis en Japanujo, temo el la propra scienco de la aŭtoro, aŭ pri liaj studoj pri la mirinda mondo de la poleneroj (polengrajnoj), kaptitaj el la aero, aŭ prenitaj el profundaj tavoloj de la tero, kie ili konserviĝis tra jar-miloj kaj raportadas detalojn pri la historio de la planta regno laŭ la ŝanĝanta klimato sur la loko, tiam aperas antaŭ ni vastaj perspektivoj de naturleĝoj, kaj viviĝas la plurdek-miljara historio de la homaro.

Same, kiam el la animala regno li rakontas pri la familia vivo de la goriloj kaj aliaj simioj, laŭ esploroj precipe de japanoj en Japanujo kaj Afriko, tiam la leganto denove en kapta maniero informiĝas pri la moderna vigla branĉo de la zoologio, kiu specialiĝis pri la studo de la konduto de bestoj — kun perspektivoj gravaj al la studoj pri la konduto de la homoj!

La libro estas provizita per *glosaro* aranĝita kronologie laŭ la paĝnumeroj, kie aperis la glosoj, kun indiko de japanaj tradukoj. Estas bedaŭrinde, ke la aŭtoro ne faris alfabetan indeksan kun difinoj de la gravaj terminoj neenhavataj en Plena Vortaro, kaj kun traduko ankaŭ al iu eŭropa lingvo, ekz. la angla. Tia indekso devus troviĝi en ĉiu scienca aŭ popularscienca libro en Esperanto, por ke ĝi estu plene utiligata. Detalo — tamen grava.

La libro estas bela aldono al nia neabunda popularscienca literaturo, kaj mi kore esperas, ke oni ĝin laŭmerite vaste legu kaj ĝuu!

Paul Neergaard (Kopenhago)



Paul Neergaard

Boulogne 1905 — Testo kaj triumfo. 34 p.

La homaranismo de D-ro L. L. Zamenhof, de C. van Kleef. El la nederlanda tr. C. Ribot. 34 p.

Aŭtografoj de D-ro L. L. Zamenhof, de A. Ribot. 28 p. Ĉiuj: Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1965. (Kolekto "Zamenhof en sia tempo" n-roj 1-3) 16 × 12 cm. Po 1,80 gld. *

Sekvante sian politikon re-eldoni klasikaĵojn, E.F.E. iniciatis ĉiu tiun bonegan Kolekton. N-ro 1 represas la anoniman raporton pri la 1a U.K. el *Lingvo Internacia* de Aŭg. 1905, kun malmultaj modifoj, inkl. tamen sporadan "itismigon". Notu ankaŭ, ke ĉe 13/10 L. I. havas *po-naciaj*; 13/-6 ĉiuj sekvas *sinjoroj*; 15/-4 antaŭ *leterojn* ald. aŭ *senesperigantajn*; 18/18 kaj -3 de *(la) nomo de*; 21/-6 *kodifikis*. Nekorektitaj preseroj el L. I.: 17/8 *pintiganta*; 11/-11 *inter* (anst. *antaŭ*), — eraro ripetita en O.V. 365, kiel indikite en *Brit. Esp.* 1957, p. 107. Plaĉas *ekgriza viro* (16). Ne plaĉas *sia* (25/-9), kvazaŭ Z. malbone elparolis. Mi scivolas pri la "elektra instruilo por Esp." kaj la Vixol-Syndicate (9). Interese, ke la ekleziaj estroj malpermesis predikon en Esp. (14). Aparte valora la brila parolado de Kabe, la "Publika Danko" de Z. (L.I. p. 421), kaj p.k. de Z. al S-ro P. Boulet, Sekr. de la Organiza Komitato (videbla en foto apud Michaux), kiu verkis la Antaŭparolon.

Ankaŭ n-ro 2 ne konsistas el nura represo de dokumentoj el O. V., sed surbaze de Historioj de Dubnow, Halecki, kaj Nillesen montras ĝis kia grado politikaj okazaĵoj naskis kaj daŭre influis la pensadon de Z. en ĉi tiu kampo. Citaĵoj el O.V. bedaŭrinde ripetas la preserojn indikitajn en la citita loko de *Brit. Esp.* (aŭ en *Waringhien*, Eseo p. 70), nome 32, unua vorto: legu *mondo*; 34/16 kaj 17 legu: *sengenta* kaj *povos*. Mi kaptas la okazon aldoni: enmetu komon kaj *moki* post *malami* ĉe 33/-3 (O.V. 342/-12). Ĉe noto 85 p. 25 legu: *Baha por Zamenhof*.

N-ro 3 konsistas tute el ne-eldonitaĵoj: 13 p.k. (fotitaj), kiujn inter 1893 kaj 1906 Z. sendis al J. Lemaire, filo de la pioniro René, la sekretario de Beaufront. (Ĉe la lasta elfalis *mi* post *tiom* en la 3a linio). Ŝajne neregistrita estas *monigo* (de poŝtmarkoj). Klariĝas nun kial mankas n-ro 58 en la "Listo de la esp-a literaturo ĝis Junio 1898", kaj montriĝas, ke la lernolibro de Oreškov (v. *Encikl.*) publikiĝis kontraŭ la volo de Z. (Sed kiu estas tiu lia verketo, kiu al Z. "impresis tre malagrabla kaj malĝoje"?).

Per ĉi tiu Kolekto E.F.E. multe ŝuldantis nin. Ni avide atendas la promesitan *Marta*.

D. B. Gregor (Britujo)

* Mendu ĉe UEA

esperanto
decembro 1965

LA UNUA ĤEMIA REVUO EN LA INTERNACIA LINGVO



Kemio internacia. Eld. Urugvaja E-Soc. Duonjara revuo, 73 p. 22 × 16 cm., il. Jarabono: 3,60 gld. (14,4 st., \$ 1.00) *

Kun vera ĝojo ni tenas en la manoj la unuan numeron de la revuo "Kemio Internacia" — la unua ĥemia gazeto en la historio de Esperanto. Certe apero de ĉiu nova scienca eldonaĵo estas tre grava kaj signifa evento en nia movado. La numeron malfermas seslingva mallonga enkonduko, klariganta la celojn de la gazeto, kaj ekstrakto el "La Kuriero de Unesko" pri Pugwash-Konferenco de 1964. La spektro de la temaro estas tre larĝa — de geologio ĝis medicino, sed la plimulto de artikoloj — kvin el ok — traktas diversajn metodojn de ĥemia analizo — la kromatografian, nefelometran kaj volumenan, en apliko al naturaj kaj neorganaj objektoj. Tri artikoloj estas tradukaĵoj de materialoj, prenitaj el nacilingvaj gazetoj. Ŝajnas tamen, ke publikigo de tradukaĵoj havas sencon nur por materialoj havantaj komunan intereson; al tiaj apartenas nur la artikolo "Risko ĉe la laboro kun hidrargo" de d-ro J. Kopečný (Ĉeĥoslovakio).

Al mankoj de la unua numero apartenas ankaŭ ne sufiĉa redaktado, kio estas des pli bedaŭrinda, ĉar ellaborado de ĥemia terminaro estas unu el la ĉefaj taskoj de la gazeto. Kelkfoje samaj nocioj estas transdonitaj per diver-

saj aŭ diversradikaj vortoj. Ekz. ni renkontas *norman* kaj *normitan* solvaĵojn, dum la plej taŭga vorto ŝajnas esti "normala"; *alkalion* kaj *alkalsolvaĵon*, *kompletu* anst. kompletigu, sed *solvigu* anst. solvu. La vorto "malvarmigilo" ŝajnas tre peza, kial ne "fridilo"? Kelkaj esprimoj ŝajnas netrafaj laŭvortaj tradukoj de nacia lingvo, ekz. *kun* aŭ *sub* la ekzisto (en ĉeesto), *kuranta* (ordinara) fumarata acido. Tio aparte koncernas la tradukon de la artikolo de d-ro Kopečný, kie ni renkontas la esprimojn *elvo-kita* anst. kaŭzita, *en medicino*, *agrokemio*, anst. inter medicinistoj, *agroĥemiistoj*, *nivelejo* anst. kvantoj, *ekkaptiĝas* anst. sorbiĝas.

Krom la ĉefaj artikoloj la kajero enhavas tabelon de la atomecoj de la elementoj laŭ la karbona skalo kaj rubrikon "Tekniko, industrio, esploro nun en la mondo", kiu enhavas artikolojn pri sciencaj konferencoj, kongresoj, kaj novaj teknikaj inventoj. Oni povas bedaŭri pri manko de referaĵoj pri pure sciencaj novaĵoj. Al la libro estas aldonitaj eltondeblaj slipoj por ĉiu artikolo; ili estas certe tre utilaj, same kiel la nacilingvaj resumoj.

Do, prosperon al la novnaskito! Ĝia sorto estas en la manoj de esperantistoj-ĥemiistoj. Subtenu ĝin per aĉetado, disvastigado kaj kontribuado!

B. V. Tokarev (Moskvo)

Priručnik za konverzaciju. Eld. Jugoslaviaj Fervojoj, Beograd, 1965. 38 p. 20 × 13 cm. Fervoja frazlibreto serba - franca - germana - angla - itala - esperanta. 1,80 gld. *

La fervojaj administracioj troviĝas en la embaraso, ke la trajnpersonaro ne regas sufiĉe da fremdaj lingvoj. Tial la Jugoslaviaj Fervojoj eldonis broŝuron kun preparitaj demandoj kaj respondoj en ses lingvoj. Inter tiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. Enkonduke la alparolita persono estas petata montri en la broŝuro la deziratan lingvon kaj serĉi la koncernan demandon. Numerala sistemo ebligas trovi la tradukon. La sistemo ne estas nova kaj ne taŭgas en ĉiuj situacioj. Sed la trajna personaro disponas almenaŭ pri lingva helpilo. Gratulon al la jugoslavaj fervojistoj, kiuj instigis sian administracion apliki Esperanton en tiu medio, same kiel jam en horaro kaj prospektoj.

W. Barnickel (Frankfurt/Main)


Report on the teaching of Esperanto from 1948 to 1964. (Raporto pri E-instruado 1948-64), de Norman Williams. Eld. la aŭtoro, Britujo, 1965. 20 p. 17 × 21 cm., multobl. Prezo: 1,— gld. *

Tiu ĉi dulingva raporto prezentas kelkajn observojn pri la relativa facileco de Esperanto por anglaj lernejoj kaj pri ĝia influo al lernado de la franca lingvo. Tre bedaŭrinde, la manko de scienca planado kaj statistika analizo signifas, ke ĝiaj kriterioj ne povus kontentigi la edukajn aŭtoritatojn.

Ĉar la sama kritiko validas pri la konata eksperimento en Finnlando (1958-1963), necesas instigi ĉiujn instruistojn, kiuj projektas novajn eksperimentojn, antaŭe interkonsiliĝi kun CED pri la plej utilaj metodoj.

V.S.

H. C. ANDERSEN



LA NOVAJ VESTOJ DE LA IMPERJESTRO
KAJ LI ALIAJ FABELOJ

numraj kaj sagaj fabeloj por
plenkreskuloj. Luksa libro en
granda formato kun multaj ko-
loraj ilustraĵoj.

Prezo nur 30 steloj.

Eldonejo Koko - Kolby Kaas



Danlando

Petu la senpagan Koko-revuon.

La sorto de homo, novelo de Miĥail Soloĥov, Tr. A. Agosti kaj N. Danovskij. Eld. Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj, Moskvo, 1965. 40 p. 21 x 14 cm. Multobl. 1,50 gld.*

Milito estas fizika erupcio de la malamo. Necesas nur ekveki la ĉiam latentajn pasiojn ĉe unu flanko. Unu malamo induktas la alian kaj fine ĉi tiu "ĉenreakcio" eksplodas en reciproka hekatombo.

Kaj eĉ la plej mildaj animoj ne povas sin tiri elsub la amasfuriozo. La "patriotaj devoj" ĉiun igas kunekzaltiĝi. La vojon de la patrujdefendo signas reciproke cindrigitaj hejmoj, sangaj infankadavroj, orfoj, vidvinoj, neniiĝitaj feliĉoj, malsato kaj mizero. La sorto de la "mond' - eterne militanta" estas morto, aŭ kripla, malfeliĉa vivo.

Ĉi tion celas dokumenti la romaneto "La sorto de homo". Homa voĉo al homoj, akuza akto kontraŭ la militismo de la konata aŭtoro de "La silenta Don".

Sur la traduko ankoraŭ iome sentiĝas la longa senesperanteco. Troviĝas kelkaj naciismoj

kaj misesperimoj, sed la tradukintoj estas videble talentaj, de kiuj ni esperas baldaŭ la plej bonajn rezultojn. Rodnas Ozac

La vojoj de la Eklezio, de Papo Paŭlo VI. El la latina tr. William Perrenoud. Eld. "Ekuмена Esperanto", Svislando, 1965. 76 p. 19 x 13 cm. 3,50 gld. (14 st.)*

Resumo: Encikliko de 1964 pri la triobla tasko de la katolika Eklezio: esplori sin mem, siajn celon kaj originon, rejunigi kaj aktualigi sin, kaj "iniciati dialogon kun la Homaro, interne de kiu ĝi vivas".

Kredo al Dio en la atomepoko, de Gustaf Lundberg. Trad. Erik Carlén. Eldona Societo Esperanto, Malmö, 1965. 46 p. 19 x 12 cm. 3,35 gld. (13,4 st.)*

Resumo: Tezante homan kaj socian disfalon per ateismo kaŭzitan, rigardante senpova la sciencon fronte spiritaĵojn, kaj nepra interhoman respondecon surbaze de amo, la aŭtoro asertas kredon al Kristo kiel solvon.

STELO 1964-1965. Studenta Tutmonda E-ista Ligo. Eld. Studenta Scienca Rondo de E-istoj, Toruń, ul. Moniuszki 16/20 DS.3, Pollando. 53 p. 23 x 17 cm., ofsetita. 500 ekz. Senpaga raporto.

Dua kanzonaro de D. Selso. La centekzemplera eldonejo, Argentino, 1965. 21 x 16 cm., mult. Popularaj kanzonoj argentinaj. 2,— gld.*

La buĉejo, rakonto de Stefano Echeverría. El la hispana tr. Diego Selso. Eld. la aŭtoro, Argentino, 1965. 40 p. 21 x 16 cm. mult. 2,— gld.*

Bahaismo - la religio de Paco, de Lidja Zamenhof. Reeld. Bahaa E-Komitato, Neckargemuend ap. Heidelberg, 1959. 8 p. 21 x 15 cm.*

Esperanta mozaiko, de Gösta Henriksson. Eld. la aŭtoro, Malmö, 1965. 46 p. 22 x 17 cm., multobl. Aŭtobiografiaj artikoloj. 2,80 gld.*

Teenage Esperanto. Prononcinstrua disko fleksebla, 45 t.m. Eld. L. Hartridge, Croydon, Britujo.

Vienaj legendoj. Traduke kompilis Alberto Mair. Eld. Aŭstria E-Federacio, Vieno 1965. Foto-represo. 46 p. 14 x 10 cm., il.

Du temploj, kulturhistoria studo de Gösta Henriksson. Eld. la aŭtoro, Malmö 1965. 8 p. 22 x 17 cm., multobl. Ne vendata.

Kioto. Oni bv. noti, ke la kolora prospekto menciita en la sept-oktobra "Esperanto" estas ricevebla nur kontraŭ rpk., kaj nur ĉe jena adreso: Kansai Ligo de E-Grupoj, Nakatuhamadōri 3-10, Ooyodoku, Oosaka, Japanujo.

70 Jarojn La Naturamiko. Eld. Naturfreunde-Internationale, Dreikönigstr. 7, 8002 Zürich, Svisujo. 1965. 64 p. 30 x 21 cm. Kvinlingva (G, F, Ne, A, Eo) kajero abunde ilustrita. 1,50 gld. (6 st.)*

Akceptu Sinjoro. Komunaj preĝoj kaj kantoj dum la Sankta Meso. Kompilis Ludwig Thalmaier. Eld. IKUE, 1965. 20 p. 15 x 11 cm., ofsetita. 0,65 gld. (2,6 st.)*

Szeged. Eld. Idegenforgalmi Hivatala, Szeged, Hungarujo. Senpaga kolora faldfolio.

Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio, de Marinko Ĝivoje. Represita el "Jugoslavia Fervojoisto". Zagreb 1965. 76 p. 28 x 21 cm., il. (Eldono jam elĉerpita).

Romanshorn. Eld. Verkehrsverein, Rütihof, Ch-8590 Romanshorn, Svislando. Senpaga ofsetita turisma folio.

Esperanto: A new Approach (laŭ nova metodo), de William Auld. Eld. Heroldo, Bruselo, 1965. 92 p. 19 x 13 cm. Lernolibro por angla-lingvanoj. Kvanto: 2000 ekz. 4,50 gld. (18 st.)*

Elementa kurso de Esperanto, de Venlo Fon. Eld. Ĉina E-Ligo, Pekino. Kvara eldono, 1964. 353 p. 18 x 13 cm. Por ĉinlingvanoj.

La komencanto, de G. P. de Bruin. Eld. Libroservo F.L.E., Nederlando, 1965. Oka eldono. 127 p. 23 x 15 cm. 3,90 gld.* Lernolibro por nederlandlingvanoj.

Katolika terminaro, Esperanto-Nederlands, de H. Roosen, S.C.J. Eld. Internacia Katolika Informejo, Nederlando 1965. 56 p. 20 x 14 cm. 1,— gld. (4 st.)*

Apelo. Eld. Dana Kampanjo kontraŭ Atomarmiloj, Dronningensgade 14, Kopenhago K, Danlando. Senpaga faldfolio 6-lingva.

Generala katalogo de feraĵoj. Eld. E. Gherardi e Hijos S.A., Av. Ovidio Lagos 1500, Casilda (S.Fé), Argentino. 20 p. 23 x 17 cm., il. Tekstoj hispana, portugala, angla (?) kaj Esperanta. La katalogon oni sendas nur al tiuj, kiuj petas ĝin per oficiala skribopapero de tiufaka komercejo.

Svislando salutas! Eld. Karl-Heinz Mischler, Franklinstr. 29, CH-8050 Zürich, Svislando. Kolorilustrita kalendaro 1966. La kalendaro 1967 estas antaŭmendebla ĉe la eldonanto. Prezo ink. afranko: (ĝis 30.4.66) 9 rpk.; (post 30.4.66) 11 rpk.

Mirinda lando. Originalaj poezio kaj prozo de Diego Selso. Eld. la aŭtoro, Buenos Aires, 1965. 37 p. 21 x 16 cm., multobl. 2,— gld.*

Korekto: La "Historio de Esperanto" vol. II (Courtinat) kostas ne 18,— gld., sed 13,50 gld.*

ricevitaj eldonadoj

esperanto
decembro 1965

mallongaj novaĵoj

LAŬLANDE

Aŭstrujo

● Pro (sukcesa) operaciigo de la fondinto kaj direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, s-ro Hugo Steiner, la gvidadon de la muzeo transprenis d-ro Walter Hube.

Francujo

● Laŭ multjara tradicio gelernantoj el kursoj de s-ro Pierre Delaire ĉi-somere gastis en eksterlandaj familioj, nome en Nederlando kaj Jugoslavio, tiel spertante praktike la internacian utilon de la lingvo.

Israelo

● "La voĉo de Izraelo" nomiĝas nove ekaperinta gazeto en lingvoj Esperanta, hebrea kaj juda, kiu celas instrui Esperanton kaj peri komercajn interŝanĝojn. La unua, ofsetita kajero kostas 0,50 isr. pundon. Adreso: s-ro H. Rusak, Zamenhofa Str. 12, Jeruzalem.

Nederlando

● La tradicia Trilanda (nederlanda-belga-germana) Renkontiĝo en Heerlen, kun 60 partoprenantoj, festis la 20-jaran ekziston de U.N. kaj sendis gratulon al U Thant.

Sovetunio

● La unuan Uzbekistanan E-Tendaron en aŭgusto, je preskaŭ 2000 m. super la marnivelo, partoprenis 76 personoj de 11 nacioj el 24 urboj de Sovetunio. Somera universitato konsistis el 9 prelegoj. Raportis uzbekaj radio kaj gazetoj.



Svedujo

● S-ro Erik Carlén, vic-prezidanto de UEA kaj estrarano de KELI, festas la 15-an de januaro sian 60-jariĝon. Ni sendas plej korajn gratulojn kaj bondezirojn!

Svislando

● La ĉi-jara 3-landa renkontiĝo fine de septembro, kun inaŭguro de la unua Esperanto-strato en Svislando, allogis 116 partoprenantojn 8 prelegoj. Raportis uzbekaj radio kaj gazetoj. el 9 landoj.

LAŬFAKE

Aŭtomobilistoj

● La Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista atingis ĝis oktobro de ĉi tiu jaro 400 kotizintajn membrojn. La organo "Aŭto-revuo", kun ilustrita faka terminaro, aperadas regule.

Bibliaj studoj

● La dua eldono de "Biblia Revuo", eldonata en Aŭstralio, donas sur 88 paĝoj studojn pri "La Mesio-prediko de Johano Baptisto", "Dek du teorioj pri la Alta Kanto de Salomono", "Modernaj metodoj por la instruado de semidaj lingvoj", "La apostolo (T)addaj" kaj "Poezio hebrea".

Literaturo

● La 400-stelan premion "Comella-Bassols" por la plej bona gaja rakonto en Esperanto (vidu "Esperanto" majo p. 93) gajnis ĉi-jare s-ro Gabriel Mora-Arana, el Manresa, Katalunujo, pro rakonto "Pedagogia fiasko". Juĝis Clelia Conterno, Lluís Mimó, N. Macpherson kaj Francesc Vilà.

Radio

● En decembro okazas la 1000-a radio-elsendo de Radio Vieno II de post 1945.

Unuiĝintaj Nacioj

● La bulteno "Secretariat News" en sia n-ro 18 publikigis parton de la Ĉarto de U.N. en Esperanta traduko.

nekrologoj

S. V. OBRUČEV (1891-1965)

Fine de aŭgusto 1965 forpasis en Sovetunio prof. d-ro S. V. Obruĉev, membro de la Akademio de Esperanto ek de 1964, siatempe kunredaktanto de "La Ondo de Esperanto" (1909-1917).

AGOSTINO BRIZZI (1894-1965)

Forpasis en Pisa la 7-an de aŭgusto s-ro Agostino Brizzi, literaturisto, kiu lernis Esperanton en 1920. Li postlasis manuskripton de ampleksa vortaro itala-Esperanta.

FRANCESCO GERACI

La 12-an de aprilo forpasis 66-jara mezgrada profesoro Francesco Geraci. En 1961 li kunorganizis la unuan kunvenon de siciliaj esperantistoj, kiu rezultigis la restarigon de la tiea movado.

SIMON SAFT

La 2-an de septembro mortis 66-jara s-ro Simon Saft el Salford, Britujo. Kvankam li eklernis la lingvon nur en 1951, li de tiam estis tre aktiva precipe en la brita movado.



Foto dekstre: s-ro D. Murphy parolis ĉe la tombo de Hideo Yagi (vd. novembro p. 194)

EN LA GRUPOJ

Jen kelkaj sugestoj por agado de lokaj grupoj en la venontaj monatoj:

1. *En decembro ankoraŭ kolekti subskribojn* por la Propono al U.N., kaj tuj forsendi ĉiujn foliojn, ankaŭ la nur parte plenigitajn, al la C.O. en Rotterdam. Limdato por ricevo: 31 dec.

2. *Komune pristudi* (eventuale en komitato) la artikolon de la Prezidanto de UEA pri modela Esperanto-societo (nov., p. 182; dec. p. 202) kaj konsideri, kio el ĝi estas imitebla.

3. *Aranĝi diskuton kun enkonduko*, pri la temo "Kio el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas jam efektivebla sed ankoraŭ ne efektivigita en nia lando." (La 10-a de decembro estas la Tago de Homaj Rajtoj.) La Esperanta teksto de la Deklaracio aperis en "Esperanto", 1963 novembro, p. 188, ricevebla kontraŭ afranko el la C.O.

4. *Iniciati ĝemeliĝon de la grupo kun ali-landa*. En junio, ekzemple, la E-grupo de Gray (Francujo) ĝemeliĝis kun tiu de Oberkirch (Germanujo), kies anoj vizitis la francan urbeton. Tiamaniere la grupoj esperas instigi ankaŭ la urbajn instancojn oficiale ĝemeliĝi.

5. *Organizi intergrupajn debatojn* pri aktualaj temoj. Tiel faris tre sukcese grupoj en la regiono de Wellington, Nov-Zelando. Specimena temo: "Ĉu la pozitivaj rezultoj de kosmaj esploroj valoras la elspezojn?"

6. *Sendu koncizan informon* pri viaj plej sukcesaj agadoj por mencio en ĉi tiu rubriko. Bonaj ideoj meritas imiton.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la julian numeron.

SVISA RADIO dissendadis ĉiusemajne de la jaro 1946 ĝis la fino de 1964 interesajn prelegojn de la bedaŭrata D-ro Edmond Privat, de D-ro Arthur Baur kaj de S-ro Gacond. Ni ĝojas anonci la redaŭrigon de la elsendoj laŭ la antaŭa programo, tio estas: lunde kaj merkrede de 12.00 ĝis 12.10, ĵaŭde kaj sabate de 21.15 ĝis 21.25, per ondoj 48.66 m. (6165 kcs) kaj 31.46 m. (9535 kcs). Pli ol iam raportoj pri aŭskultado estos bonvenaj; skribu al Svisa Radio, S.O.C., 3000 Bern-16, Svislando.

RADIO PRAHA plioftigis la elsendon en Esperanto, kiu antaŭe okazis la lastan ĵaŭdon de la monato dum la programo por Aŭstrujo. Sama tempo, sama ondlongo, sed nun alterne ĉiun duan ĵaŭdon.

INTERNACIA ĤORO ?

letero

Jam ekzistas Internacia Arta Teatro, kiu multe riĉigis la programojn de niaj kongresoj. Ĉu ne estus bone starigi Internacian Esperanto-Ĥoron? Kvankam la elekto de muzikaĵoj ĉiujare povus esti farata sufiĉe facile, la ideo pri Internacia Ĥoro eble ŝajnas nerealigebla, precipe pro la malfacileco de kuna ekzercado. Tamen, se IAT povis superi siajn problemojn, mi kredas, ke la afero meritas provon.

B. Najbaro

Oakworth, Britujo, 23 okt. 65

SONBENDOJ EL TOKIO

Dank' al bonega laboro de s-ro Katoo koiĉi la aranĝoj de la 50-a U.K. estis modele surbendigitaj kaj estas nun disponeblaj en la kolekto de la Magnetofona Servo. Pere de ili la tutmonda esperantistaro nun povas — almenaŭ orele — denove travivi nian jubilean kongreson. Jen la listo de la Magnetofona Servo. Bonvolu zorge legi la paĝojn 143/144 en la Jarlibro 1965/I pri la kondiĉoj kiel tiuj programoj estas akireblaj.

R. Eichholz, komisiito de UEA pri la MS.
Cardiff, Ontario, Kanado

La 50-a Universala Kongreso de Esperanto

183. Solena Inaŭguro	180
183a La sama, sen nacilingvaj paroladoj	140
183b Festparolado de Carlo Minnaja	20
184. 1-a Ĝenerala Kunveno de UEA	115
185. 2-a Ĝenerala Kunveno de UEA	120
186. Unua Labora Sekcio 'Aspektoj de Internacia kunlaborado'	165
187. Dua Labora Sekcio: 'La lingva problemo en la internaciaj ekonomiaj rilatoj'	105
188. Oratora Konkurso	60
189. Belarta Konkurso	60
190. Japana Vespero (partoj)	60
191. Teatro Populara de Łódź prezentas 'Kataki' (de Shimon Wincelberg)	120
192. Inaŭguro de la I.S.U. kaj parolado de prof. F. Egami: 'Kio estas molekula	

biologio'	33
193. Prof. Stöp-Bowitz: 'Ĉu organismoj travivis la glaciepokon en la nordo?' ..	45
194. Prof. S. Kawamura: 'Sojoj kaj sojproduktokiel japanaj manĝaĵoj'	40
195. Prof. M. Suzuki: 'Elektreco kaj vivadoj' ..	45
196. Prof. R. A. Lewin: 'Algoj'	50
197. D-ro C. Minnaja legas la prelegon de prof. Lapenna pri 'Dudekjara evoluo de Unuiĝintaj Nacioj'	45
198. Fermo de la 50-a UK	85


SIMBOLAJ ALIĜOJ

La simbolaj aliĝoj al la 50-a Universala Kongreso en Tokio estis parte listigitaj sur paĝo 5 de la Suplemento al la Kongresa Libro. Ĉi sube sekvas tiuj, kiuj alvenis post presigo de la Suplemento. Al ĉiuj simbolaj aliĝintoj U.E.A. kaj L.K.K. esprimas sian koran dankon pro tiu subteno al la unua U.K. en Azio.

S-ro Francesco Ramolfo, Italujo.
S-ro A. Figuerola Anque, Hispanujo.
S-ro R. Tavernier, Francujo.
S-ro Trygve Raimar, Norvegujo.
S-ro A. Ebbinge, Nederlando.
F-ino M. Kammerer, Germanujo.
F-ino S. Bueno de Mesquita, Nederlando.
S-ino Klara Schmiedeberg, Germanujo.
S-ino Annemarie Orterer, Germanujo.
Frato J. Nagy, Aŭstrujo.
S-ro V. Röder, Germanujo.
D-ro T. Kudov, Germanujo.



esperanto
decembro 1965



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**



Eugène Raveloson

ENKONDUKO DE ESPERANTO EN MADAGASKARAJN LERNEJOJN?

La 31-a de aŭgusto restas memorinda tago en la historio de Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro (fi.es.ta.ma.), ĉar tiun tagon vizitis la Ministron por Kulturaj Aferoj, s-ron Laurent Botokeky: la prezidanto, s-ro Eugène Raveloson; la vicprezidanto, s-ro Désiré Rabevazaha, estrarano pri lernejoj kaj la ĉarma sekretariino, 19-jara studentino, f-ino Elisabeth Vaosoloharifidy.

Jen resumo de la konversacio kun la Ministro.

Prezidanto: S-ro Ministro, unue ni gratulas vin pro via reelektiĝo, kiel deputito kaj kiel Ministro por Kulturaj Aferoj dum pliaj sep jaroj, post renovigo de la konsisto de la Registaro.

Ministro: Mi multe dankas vin.

Prezidanto: S-ro Ministro, ni alvenas tie ĉi por preparoli al vi la instruadon de Esperanto. Ni ne scias, ĉu vi ja ricevis niajn antaŭajn leterojn.

Ministro: Jes, mi ilin ricevis, kaj la lasta atingis min antaŭ nelonge. Iam, mi memoras, mi legis iun priesperantan libron, kaj ricevante vian unuan leteron, mi min demandis, ĉu tiu lingvo ankoraŭ ekzistas. (Certe li lernis Esperanton, sed tion li ne volis konfesi, ĉar li prononcas perfekte: Universala Esperanto-Asocio. Ankaŭ la konversacio estis intima.) Ĉar oni ĵus nomis min Ministro por Kulturaj Aferoj, mia laboro estas vasta, ne kiel antaŭe, kiam mi estis Ministro pri Nacia Edukado, mi do ne devas preterlasi Esperanton, sed, ŝajnas al mi, la situacio nun estas malfacila, ĉar ni devos dungi profesorojn, tamen la kredito de mia ministerio ne permesas al ni nun. Mi tamen restas favora al Esperanto.

Prezidanto: Ĉu almenaŭ vi ne povas oficialigi ĝin?

Ministro: Sed tiukaze, ni devas pagi profesorojn...! Kaj nun kiom da profesoroj estas en Madagaskaro?

Prezidanto: Tri aŭ kvar posedantoj de la atesto pri kapableco, tiuj de la atesto pri supera lernado estas multaj.

Ministro: Do vi vidas! Vi estas malmultaj; kaj kiom da membroj havas via asocio?

Prezidanto: Nuntempe la nombro malpliiĝas...

Ministro: Sed kiam ĝi estos oficialiginta, vi konstatos, ke multaj lernos ĝin. Jen kion vi devas fari: organizu oftajn prelegojn en Tananarivo, ke la publiko estu informita kaj eksciui pri la lingvo. Tiam vi raportos al mi pri la rezulto kaj, depende de tio, mi aranĝos

kunvenon kun vi kaj miaj teknikistoj en mia oficejo mem por pristudi ties oficialigon. Nepre raportu al mi! Ĉu vi ĝin parolas bone?

Prezidanto: Jes! Bone! Mi deklaras al vi, ke en la komenco, kiam mi eklernis Esperanton, mi estis kontraŭ ĝi, sed la 47-a U.K., kiun mi ĉeestis en Kopenhago, konvinkis min, tie mi vidis proksimume 2 000 personojn el 44 landoj, kiuj aplaŭdis kaj ridis samtempe...

Ministro: Faru, kion mi diris al vi!

Prezidanto: Ni dankas vin, s-ro Ministro. Post iom da tempo ni revenos por diskuti kun vi pli detale la aferon, ĉar nun jam noktiĝas kaj ni redankas vin. (Antaŭ la foriro, la estraranoj donacas al li dokumentaron, kiu konsistas el: peticio subskribita de la tri estraranoj, nomoj de kursgvidantoj, kopio de la oficiala Deklaracio de Bulonjo-sur-Mar, statistikoj de Esperanto-kursoj en Madagaskaro kaj en francaj lernejoj, eltiraĵoj de rubrikoj pri instruado de Esperanto en diversaj lernejoj de la mondo, kopio de la Rezolucio de Unesko, la programo kaj regularo de la E-ekzamenoj de Franca Esperanto-Instituto, 2 ekzempleroj de la statuto de fi.es.ta.ma. (en franca kaj malagasa lingvoj), 1 ekzemplero de la Jarlibro de UEA 1965, kiu multe interesas la Ministron).

Ministro: Mi ĝoje vidas gejunulojn agemajn kiel vi.

La kunveneto finiĝis per reciprokaj bondeziroj. Al la estraranoj elirantaj la pordon la Ministro petis, ke ili ne forgesu raportu al li.

PERANTO DE TEJO

Kiel peranto de TEJO en Orienta Germanujo funkcias la estrarano pri junularaj aferoj de Centra Laborrondo por Esperanto ĉe la Germana Kulturligo, s-ro Hans Eichhorn, Gross-Sedlitzer Str. 54, 83 PIRNA, Orienta Germanujo.

BRIGADA ESPERANTO-SOMERO EN BULGARUJO

Dum julio sur la belega Vitoŝa-monto apud Sofia okdek junaj esperantistoj el diversaj lokoj de nia lando partoprenis la Nacian Junularan Brigadon, kiu konstruas libervole la Panoraman montan vojon. La plejmulto el la partoprenintoj estis gelernantoj, kiuj malgraŭ sia juneco laboris fervore kaj entuziasme.

Ĉe tre bonaj kondiĉoj, loĝante en tendoj kaj donante sian helpon por la plibeligo de nia ŝatata monto, la junuloj-esperantistoj ne forgesis agadi por la Internacia Lingvo.

En la kadro de la brigado estis organizitaj renkontiĝoj kun la sofia esperantistaro kaj kun bulgaraj verkistoj. Unu vespero estis speciale dediĉita al Esperanto por ĉiuj partoprenintoj. Sed la plej grava atingo estis la okazigo de E-kurso por la studentoj-brigadanoj el Sovetunio, sub la gvido de la juna esperantisto Bojidar Leonov.

Preskaŭ en la sama periodo funkciis alia Nacia Junulara Brigado ĉe Kemia Kombinumo apud urbo Vraca. Ankaŭ tie la juna Bojĉo Mladenov organizis E-kurson.

Vasja Petrova, Sofia

GRAVA NOTO:

**La 22-a IJK de TEJO
en Pécs okazos de 23
ĝis 30 julio 1966.**

Reguloj kaj premioj

Konsiderata kiel "nova" membro-abonanto estos ĉiu, kiu ne estis individua membro de U.E.A. en 1964, senkonsidere ĉu la koncerna persono estis MA en iu antaŭa jaro.

La varbinto bonvolu sendi poŝtkarton al la Centra Oficejo de U.E.A. kun klare skribitaj nomo kaj adreso de la varbito kaj mencio pri la elektita(j) premio(j). Tuj kiam la C.O. estos ricevinta la kotizon, ĉu rekte, ĉu pere de ĉefdelegito aŭ peranto, ĝi ekspedos la elektitan premion al la varbinto kun enkoverta numero por la lotumota granda premio de 500,— gld (2000 steloj). La varbinto ricevos tiom da numeroj, kiom da membroj li/ŝi varbis. Kiu varbos dumvivan membron ricevos 20 lotojn. La gajninta numero estos tiritita la 30-an de decembro 1966 en ĉeesto de atestantoj ekster la C.O. Pri la evoluo de la varbado detaloj estos publikigitaj en la revuo Esperanto.

Varbinto de 1 MA bonvolu elekti unu eron el jenaj objektoj:

1. japana ventumilo
2. disko "Salutparoladoj Haga U.K."
3. disko "Internacia Elparolo"
4. Zamenhof-gravuraĵo + 4 Zamenhof-poŝtkartoj
5. insigno de U.E.A.
6. "Oriento kaj Okcidento, al reciproka kompreno"

7. CED-dokumentoj CED/7 kaj A/IV/4-6
8. "Esprimo de sentoj en Esperanto"
9. "Galileo Galilei"
10. "Vagado sub Palmoj"
11. "Sankta Nikolao en Nederlando"
12. "Erna" (infanlibro)

Varbinto de 2 MA elektu 2 erojn el la supra listo aŭ unu eron el:

1. disko "Festparolado Haga U.K. 1964"
2. "Nederlando", fotolibro
3. "Infanoj ne konas limojn", fotolibro
4. "Aŭstralio, lando kaj popolo"
5. "Abismoj"
6. "Gastronomia Terminaro"
7. "Teknika Terminaro pri Ŝoseoj"

Varbinto de 3 MA elektu po unu eron el ambaŭ listoj aŭ 3 erojn el la unua listo.

Varbinto de 4 MA povas elekti 4 erojn el la unua listo aŭ du el la dua listo aŭ du el la unua plus unu el la dua listo.

Varbinto de 5 MA povas fari kombinitan elekton el la supra listoj aŭ elekti librojn aŭ abonojn je gazetoj laŭ la librolisto kaj gazetara listo en la Jarlibro, ĝis valoro de entute 10,— gld.

Varbinto de dumviva membro ricevos premion la verkon Dia Komedio.

Bonegan sukceson al ĉiuj deziras

M. H. Vermaas, direktorino C.O.

LA NOV-ZELANDA ĈAMBRO

Kiel konate, ankaŭ la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio simbole donacis ĉambron en la Domo de UEA, tiel montrante la apudecon de la koroj de niaj antipodaj membroj al la Centra Oficejo. Antaŭ iom da tempo ni ricevis liston de la kontribuintoj al tiuj kolektiva donaco. Kun granda plezuro ni ĉi sube publikigas ĝin kaj ankoraŭfoje esprimas grandan dankon al niaj fidelaj nov-zelandaj membroj.

D-ro C. J. Adcock	5. 0. 0
S-ino R. Aagaard	5. 0. 0
S-ro J. T. Allan	5. 0. 0
S-ro L. Bernstein	5. 0. 0
S-ro C. R. S. Barrett	5. 0. 0
S-ino Y. M. Canty	10. 0. 0
S-ino M. Chapman	5. 0. 0
S-ro R. Clarkson	6. 0. 0
S-ino D. B. Clough	5. 0. 0
S-ino E. M. Dean	5. 0. 0
S-ro W. F. Dean	5. 0. 0
S-ro E. R. Dearnley	5. 0. 0
S-ino P. De Cleene	10. 0. 0
S-ino G. H. Denniston	5. 0. 0
S-ro A. H. Dixon	5. 0. 0
S-ro W. J. Donovan	5.13. 0
Dunedin-Esperanto-Klubo	5. 0. 0
S-ro N. Hill	5. 0. 0
S-ro F. S. Hume	5. 0. 0

S-ro W. H. King	30. 0. 0
Gesroj J. Larsen	5. 0. 0
Lower-Hutt-Esperanto-Klubo	9. 9. 6
F-ino V. L. McAhan	5. 0. 0
S-ro M. L. McNamara	70. 0. 0
Gesroj R. Moore	15. 0. 0
S-ro S. M. Moss	5. 0. 0
New-Plymouth-Espo-Klubo	10. 0. 0
Nov-Zelanda Delegitaro	10. 0. 0
S-ro G. Pivac	10. 0. 0
Gesroj B. Potts	10. 0. 0
S-ro A. W. Potts	5. 0. 0
S-ino M. Richardson	5. 0. 0
S-ro M. J. Ravelich	5. 0. 0
S-ino E. M. Shaw	64. 2. 0
S-ino M. Taille	5. 0. 0
Takapuna-Espo-Klubo	7. 0. 0
S-ro E. Taylor	5. 0. 0
S-ro O. Thomas	5. 0. 0
S-ro W. M. Turner	9. 0. 0
Wanganui-Espo-Klubo	5. 0. 0
F-ino M. D. Wildey	5. 0. 0
S-ro E. N. Williams	5. 0. 0
S-ino L. Wills	5. 0. 0
S-ro A. G. Wiltshire	10. 0. 0
S-ino L. Wiltshire	5. 0. 0
S-ro F. Wood	5. 0. 0
56 pliaj donacoj	63.15. 6
Sume:	£ 500. 0. 0

esperanto
decembro 1965

DELEGITOJ

Aŭstralio

Rockhampton. D: S-ro John Moore, telegrafestro, Cnr. Hadgraft and Macalister Streets, Park Avenue, Rockhampton-North; tel. 6 2780.

FD (SOS-aŭto-servo): vakas.

Aŭstrujo

Linz. FD (Naturismo): vakas.

Belgujo

Overijse (Brabant) 12 500

D: S-ro Wim de Smet, muzea asistento, Drogenberg 36; tel. 02/57.83.16.

FD (Muzeaj aferoj): la D.

FD (Zoologio): la D.

St. Andries. D & FD: vakas.

St. Michiels (Brugge) (West-Vlaanderen) 10 000

D: S-ro Maurits Demol, ŝtatfunkciulo, Leopold III laan 19; tel. (050) 156.94.

FD (Muziko): la D.

Wijchmaal. D & FD: vakas.

Zaventem (Brabant) 10 000

D: Pastro Jozef J. de Maeyer, Kerkplein 17; tel. 02.200549.

Brazilo

São Paulo. FD (Pentro-arto: ĉina lako): S-ino Symilde Schenk Ledon, sekretariino, Rua Júlio Ribeiro, 920, casa 8, Santo Amaro, São Paulo-18.

Britujo

Addlestone. JD: vakas.

Enfield (Middlesex) 110 000

D: S-ro Geoffrey King, studento, 12 Elmer Close; tel. ENF 5111.

Harrogate (Yorks.) 53 000

D: S-ro Thomas Holland, elektronik-inĝeniero, 37 Wayside Avenue; tel. 83722.

Urmston. FD (SOS-aŭto-servo): la D.

Ĉeĥoslovakio

Kouřim (Čechy) 2 500

D: S-ro Břetislav Třešňák, oficisto-ekonomo, Kolínská 331, Kouřim, okr. Kolín.

FD (Edukado): la D.

Moravský Kočov. D & FD: vakas.

Finnlando

Turku. FD (Virinaj aferoj): vakas.

Francujo

Avignon. D: S-ino Simone Humm, instruistino, Chemin des Neuf Peyres.

Beziers. FD (Fervojoj): S-ro Roger Motto, staciestro, 10 rue Rossi; tel. 28 59 69.

Bourbourg. D & FD (2): vakas.

Hyères. FD (SOS-aŭto-servo): la D (Filozofio) 54 **Laxou.** FD (Turismo): la D.

Le Chambon-Feugerolles. D & FD: vakas.

Lyon. FD (Fervojoj): S-ro André Giovenal, em. trafik-fervojisto, 3 Place d'Helvétie, Lyon 6me; tel. 24.84.11.

Sarralbe. D: vakas.

Selestat (Bas-Rhin) 14 000

D: S-ro Marcel Cuené, librotenistestro, 3 Place Général de Gaulle; tel. 92.01.78.

Yvetot. FD (Instruado): la D (nova adreso: 50 Résidence Fief de Caux).

Germanujo

Oldenburg. D & JD: vakas.

7401 **Tübingen.** 55 000

FD (Lingvoj: germanistiko): S-ro Eddy Borsboom, studento pri germanistiko, Weiherhaldenstr. 13-1, Tübingen-Lustnau.

Hispanujo

Barcelona. FD (Filozofio: Krishnamurti): la antaŭa FD (Naturismo).

Gargüera. D: vakas.

Jugoslavio

Beograd. FD (Medicino): D-ro Zorica Ignjatović, kuracistino ĝenerala, Beograd-Železnik, Moše Pijade 36; tel. 57-006.

Kanado

Halifax (Nova Scotia) 100 000

D: S-ro H. J. Lewis, presisto, Box 1322, North P.O.; tel. 469-1003.

Nederlando

Heerde. D & FD (2): vakas.

Norvegujo

Arendal (Aŭstre Agder) 10 000

D: S-ro Saxer J. Ebeltoft, em. sukeraĵisto, Melkedammen 14; tel. 24383.

Pollando

Cieszyn. FD (Tekniko: malvarmigiloj aŭtomataj): S-ro Paweł Sikora, teknikisto-konstruisto, str. Bielska 66; tel. 19-62 (oficejo).

FD (Turismo): la D.

Poznań. FD (Filatelo): la VD.

Sovetunio

Moskva. (Naturscienco): vakas.

Svedujo

Alingsås. D: S-ro Arne A. E. Andersson, komercisto, Källelid, Vadsjön; tel. 14427/13295.

Malmö. FD (Sociaj aferoj): S-ro Yngve Cederholm, socia inspektoro, Sorgenfrivägen 31; tel. 110251.

Svislando

Basel. FD (Arto): vakas.

2017 **Boudry.** FD (Brajl-skribo): la D.

Thun. D: vakas.

Zürich. FD (Kemio): vakas.

Usono

Ogden (Utah) 70 000

D: S-ro Milton E. Davis, instruisto, 1643 Rushton St., Ogden, Utah 84403; tel. (801) 393-0967.

San Diego. FD (Domkonstruado): la D.

Spokane. D: vakas.

Stillwater (Oklahoma 74074) 25 000

FD (Kontraŭalkoholismo kaj kontraŭnikotismo): S-ro Edwin Hedges, laboristo, P.O. Box 1123; tel. FR 2-7429.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Chatelus, f-ino Pierrette, Lyon, Francujo.

Mijamoto, s-ino Ŝinji, Kobe, Japanujo.

Tartary, s-ino J., Paris, Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1965

366 **Grabau,** f-ino Maria, Germanujo; 367 **Rousseau,** s-ro Henri, Senegalio.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

1 **Jaehn,** s-ro W., Germanujo; 2 **Tuch,** s-ino M.R., Kanado; 3 **Culbert,** d-ro S.S., Usono.

DONACIOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Aŭstrujo: **Primetzhofer,** s-ro Felix, 6,88. Britujo: **Wolfskehl,** s-ino E., 5,—. Francujo: **Charlet,** s-ro Fernand, 35,70. Svedujo: **Persson,** s-ro Anders, 15,89.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Aŭstralio: Melburna E-Societo, 54,—. Britujo: Solar, f-ino A., 25,—. Nederlando: Cate, s-ro H. J. ten, 10,—.

Krome, ĉar UEA mem presigis la subskribofoliojn en iuj naciaj lingvoj, jenaj landaj asocioj jam kontribuis, laŭ peto de la Estraro, al la koncernaj kostoj:

Aŭstralia E-Asocio: 26,— gld.
Brita E-ista Asocio: 100,— gld.
Nov-Zelanda E-Asocio: 25,— gld.
Sumo entute ricevita: 21 330,24 gld.
Sumo elspezita: 18 020,74 gld.
Saldo pozitiva: 3 309,50 gld.

FONDAJO CANUTO

Anoj de E-Grupo Torino: Barbiellini Amidei 1 MA, Beltrami 1 MJ, Bessone 1 J-MJ, Canavero 1 J-MA, Casetta 1 J-MJ, Conterno 4 MA, Donadoni 1 J-MJ, Girolodi 1 MJ, Muretti 1 MJ, Ponzio 1 J-MJ, Vassio 2 MA, 1 J-MJ, Zina 1 J-MJ; aliaj 1 MA.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO

(Vidu "Esperanto" majo p. 94)

A. (16,— gld.): 29. Böcker, s-ro H.; 30. Michling, s-ro H., Germanujo; 31. Barbiellini Amidei, s-ro A., Italujo; 32. Lewis, s-ro H. J., Kanado.

Dumviva PM-A. (20 x 16,— gld.): 2. de Goeij, s-ro J. Th., Nederlando.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Britujo: E-Grupoj Leeds kaj Huddersfield, 20,—. Germanujo: Renken, d-ro C., 9,—; Wehrheim, d-ro H., 9,—. Nederlando: Slot-v. d. Meulen, s-ino A. M., 50,—.

FONDAJO ZAMENHOF

N.N.: 25,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1965

Stato je la 31-a de oktobro

Lando	Konkurso I		
	kvoto	poentoj	%
1. Finnlando	2365	2625	110,99
2. Belgujo	1770	1960	110,73
3. Usono	3827	4037	105,49
4. Japanujo	3745	3925	104,81
5. Svislando	1800	1840	102,22
6. Francujo	7009	7157	102,11
7. Hispanujo	2804	2860	102,—
8. Danlando	2704	2722	100,67
9. Nederlando	5140	5156	100,31
10. Germanujo	6551	6535	99,76
11. Svedujo	6190	6070	98,06
12. Britujo	6053	5807	95,94
13. Brazilo	3411	3220	94,40
14. Italujo	3932	3635	92,45
15. Norvegujo	1490	1290	86,58
16. Jugoslavio	3295	1845	55,99

	Konkurso II		
	kvoto	poentoj	%
1. Aŭstrujo	1090	1270	116,51
2. Kanado	702	769	109,54
3. Aŭstralio	1288	1308	101,55
4. Nov-Zelando	1195	1141	95,48
5. Argentino	760	715	94,08
6. Israelo	405	360	88,89
7. Islando	250	215	86,—
8. Sudafriko	250	195	78,—
9. Madagaskaro	250	120	48,—
10. Portugalujo	380	120	31,58
11. Urugvajo	250	65	26,—

(Vidu la regularon en "Esperanto" 1965 p. 38)

Nekatolikoj povas senpage ricevi la dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo" kun informoj pri la katolika religio. Skribu klare viajn nomon kaj adreson al la Sekretariejo de la "Internacia Katolika Informejo", Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Geonkloj Esperantistaj estas plenkreskuloj kiuj korespondas en Esperanto kun infanoj. Detalojn: Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo.

Sincera servo: Ĉu vi deziras aĉeti ion el Hong Kong, la paradizo de fremdlandaj aĉetantoj, aŭ ĉu vi deziras vojaĝi al Hong Kong? Se jes, bonvulo skribi al LUN FUNG TRADING CO., P.O. Box 3612, Sheungwan, Hong Kong kun respond-kupono aer-poŝta. Ni ĉiam estas pretaj servi al vi tre fidele. Nia servo kontentigos vin ĉiufanke, kaj la serv-kotizoj estos al vi tre favoraj.

Kunlaborantoj petataj el ĉiuj landoj por interŝanĝi unuataĝajn kovertojn (dek aŭ pli) aŭ kontraŭ belaj hindaj poŝtmarkoj; reciproka rekompenco laŭbezzone. Esperanta Filatela Servo, P.O. Box 604, New Delhi, Hindujo.

Klam la frosto pentros florojn sur fenestroj, tiam en nia ĝardeno floros la mimozo. Ni ludonas ĉambrojn (kuirejo) ĉe la bordo de la Lazura

Mediterraneo, 20 km oriente de Marseille. Skribu por detaloj Esperante aŭ germane: Robert Stoffers, Villa "Tabou", Cassis (B.-du-Rh.), Francujo.

Ie vivas 23-jara fervora esperantistino nekuraceble malsana, sen alies helpo ne povanta moviĝi. Dum tuta tago ŝi troviĝas en ĉambro aŭ korto de ludomo, kuŝante en infanĉareto, ĉar la gepatroj devas laborgajni. Ŝi komprenas Esperanton tre bone, sed la skribado ŝin ĝenas. Ŝi meritas feliĉon kaj ĝojon, kiujn vi povas por ŝi prepari, sendinte ilustritan salutkarton aŭ formatitajn, ne plu bezonajn librojn aŭ gazetojn esperantlingvajn al adreso: f-ino Cilka Kotyzová, ul. Drobného 1112, Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio.

Gazeto por mondcivitanoj. Mi intencas fondi gazeton, kiu sin dediĉos nur al la problemoj de mondcivitaneco. Ĝi strebos esti la centra informejo kaj diskutejo de ĉiuj (ĉiaj) mondcivitanoj. La gazeto aperos ek de 1967 kaj havos la nomon Mondano. Ĝi estos presita kun minimume kvar kajeroj jare. Skribu al mi, se vi pretas esti abononto aŭ kunlaboronto aŭ apoganto de Mondano. En via letero vi bonvolu informi min, kiom vi pretos pagi kiel abonanto (daŭrigo sur p. 224)

oficiala informilo

ANONCETOJ

esperanta
decembro 1965



Serio ORIENTO-OKCIDENTO n-ro 4

KALEVALA

la granda nacia eposo de la finnoj
verse tradukis J. E. Leppäkoski




368 paĝoj kun postprezento, lingvaj kaj ilustritaj etnografiaj klarigoj. Pli ol 100 vinjetoj kaj 1000 ornamaj komencliteroj de la fama finna artisto Axel Gallen-Kallela. Formato de "Naŭzo", "Malsata ŝtono" kaj "Rakontoj de Oogai".

Prezoj:

kun leda dorso 35,— gld (140 st)
tuttole bind. 25,— gld (100 st)

Sola vendrajto ekster Skandinavio: UEA



kvaronjara
junulara
gazeto

jarabono 8 gld.

SEN PAGE

vi ricevos la junularan revuon

KONTAKTO

dum 1966, se vi pagis kiel MA kaj naskiĝis en 1941 aŭ poste.

Tuj informu nin pri la dato de via naskiĝo !

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2

(daŭrigo de p. 223)

kotizon, kaj ĉu kaj kiom vi pretos garantii por la komenca kapitalo, ankaŭ ĉu vi povos esti kunlaboranto (peranto, artikolverkanto, tradukanto aŭ alie). Mia adreso estas: s-ro Per Edler, Frideborgsgatan 58, Härnösand, Svedujo.

Objektiva vivkoncepto necesigas novajn perspektivojn. La kutimaj kaj ordinaraj konceptoj ne sufiĉas kiel kompleta klarigo. Ni havas uzon ĝuste por novaj konceptoj kaj novaj perspektivoj. Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Atentu !!! Vigligu la eteron per Esperanto kaj fariĝu radio-amatora esperantisto! OE3RU Radio-amatora stacio esperantista. 3812 Gr. Siegharts/NÖ, Aŭstrujo.

"La Gusta Vojo" Internacia revueto por kat. kaj ĉiuj kristanaj esperantistoj aperas 2-monate. Ĝi raportas pri la evangelio, la kristana vivo, la tut-mondaj sciigoj, Esperanto-movado, rakonta parto kaj diversaĵo kun interesa enhavo, legata en pli ol 40 landoj. Jar-abono 4M. aŭ 8 resp.kup. Mendu ĉe Maria Schöttl, 8 München 19, Schulstr. 26/I, Germanujo.

Nova klaso estas starigita por 11+ jaraj knab-studentoj. Studentoj kaj simpatuloj bonvolu sendi gratulojn kaj bondeziraĵojn al: Esperantoklaso, Secondary Modern School (Boys), DISS, Norfolk, Britujo.

Korespondi kaj interŝanĝi deziras: H. Khel, Pivonková 2124, Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

Gazeto por kemio. Mi intencas fondi gazeton, kiu sin dediĉos nur al kemio sur lerneja (precipe gimnazia) nivelo. Ĝi strebos esti informejo kaj diskutejo por instruistoj, atentante pedagogiajn problemojn, kaj por gimnazianoj, donante al tiuj lokon por raportoj pri iliaj esploroj k.s. Eventuale ĝi ankaŭ estos organo de fondotaj asocioj de gimnaziaj instruistoj pri kemio kaj de gimnazianoj interesigantaj pri kemio. La gazeto ne celas konkuri kun Kemio Internacia, sed volas kompletigi tiun sur pli speciala agadkampo. Ĝi aperos ek de 1967 kaj havos (provizore) la nomon Lerneja kemio. Ĝi estos presita kun minimume kvar kajeroj jare. Skribu al mi, se vi pretas esti abononto aŭ kunlaboranto aŭ apogonto de Lerneja kemio. En via letero vi bonvolu informi min, kiom vi pretos pagi kiel abonkotizon, kaj ĉu kaj kiom vi pretos garantii por la komenca kapitalo, ankaŭ ĉu vi povos esti kunlaboranto (kiel peranto, artikolverkanto, tradukanto aŭ alie). Mia adreso estas: s-ro Per Edler, Frideborgsgatan 58, Härnösand, Svedujo.

En la lingvo sudafrika (deveninta de nederlanda kaj malaltgermana) "neĝo" nomiĝas kaj "sneeu" (nederlanda) kaj "kapók" (deveno nekonata). Samideanoj bonvole sciigu al mi ĉu "kapók" kun signifo "neĝo" troviĝas en iu eŭropa lingvo aŭ dialekto. Antaŭdankas al vi E. S. Venter, Posbus 657, Kaapstad, Sudafriko.

Esperantlingvaj urboprospekto, unutagkoverto kun E-stampita poŝtmarko kaj 36 glumarkoj kostas nur 6 respondkuponojn. Esperanto-Societo Düsseldorf, 4005 Buderich, Neusser Str. Germanujo.

En feina loko, grava realaĵo

TUTMONDA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kastelo "GRESILLON" BAUGÉ (M.&L.) Francujo

Kulturaj aranĝoj, pli kaj pli multnombraj kaj allogaj turismaj ekskursoj en lando de lumo, floroj, vinoj, kasteloj.

El la programo 1966a.

Jam planitaj estas la periodoj:

1/4-8/4: Ĉefe por la gejunuloj: KULTURA SEMAJNO, sub la aŭspicioj de la Franca Ministerio pri Edukado.

3/7-24/7: Studaj kaj Turismaj Ferioj, nedevigata preparado al tri diversgradaj ekzamenoj, gvidataj ekskursoj tra Loire-regiono.

24/7-7/8: INTERNACIAJ TURISMAJ kaj KULTURAJ FERIOJ, altvaloraj prelegoj de diversnaciaj eminentaj parolantoj, laŭplaĉe, antaŭa gvidata vizito de Parizo; dumaj diversaj ekskursoj al Loire-kasteloj, al diversaj vizitindaj urboj.

7/8-28/8: Kulturaj Esperantistaj Semajnoj.

E-Kursoj, bindado, korbo-farado, ludoj, promonadoj.

28/8-3/9: Studperiodo organizata de U.F.E.

Supera kaj praktika kursoj, ekskursoj.

Estas konsilinde rezervi la ĉambrojn sufiĉe frue.

La E-Kulturdomo estas je la dispono de grupoj por — laŭ ebleco — organizi pluajn E-renkontojn aŭ feriojn pli malpli longajn.

Programojn, detalajn informojn, kontraŭ respond-kupono.

ISLANDAJ PRAVOĈOJ

Baldur Ragnarsson donas al ni per sia eminenta traduko kaj per siaj ampleksaj klarigaj informoj novan enrigardon en la pranorda literaturo.

★

Prezo: broŝ. gld. 4,25, bind. gld. 6,75.

★

Mendu ĉe UEA aŭ via kutima libroservo

★

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

ESPERANTO: A NEW APPROACH



William Auld, M.A., D.B.E.A.

*Member of the Esperanto Academy
Principal Teacher of English at Grange School, Allos*

ELDONIS: HEROLDO

**La plej moderna lernolibro de Esperanto
por angle parolantoj!**

14 lecionoj kun ŝlosilo por memlernantoj.
Literaturaj legaĵoj el la plumo de la plej
famaj Esperanto-verkistoj.
Vortareto Esperanto-angla.

Prezo: 1,20 \$ (8/7 ŝil.)

Ciu ekzemplero entenas rabatkuponon en valoro de 0,30 \$ validan por aĉeto de "Fabeloj" de H. C. Andersen, vol. IV (trad. D-ro L. L. Zamenhof).

W. AULD instruas Esperanton laŭ nova didaktika metodo, nome laŭ la ecoj de la internacia lingvo mem kaj ne laŭ la strukturo de la angla lingvo. Aĉetu ĉe via Libro-Servo aŭ ĉe U.E.A.

Ĵus aperis

H. C. ANDERSEN

"FABELOJ"

(1-a volumo)

Traduko de D-ro L. L. Zamenhof
53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

238-paĝa eleganta eldono kun trikolora ŝirmkovrilo.
Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon validan por
aĉeto de la eldonota 2-a volumo.

Sendante al sia libroservo la rabatkuponon enteni-
tan en la 4-a volumo de "Fabeloj" oni ricevos
rabaton de 0,30 us. \$.

Prezo: 3 us. \$ (+ 10% por sendokostoj)

Liveras la naciaj libro-servoj kaj la Libro-Servo de UEA
Eldonis: "Heroldo de Esperanto", 13 rue de la Reinette-Pippelingstr., Bruselo 1



HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 45 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 19 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (55 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska